



EL POPOLA ĈINIO

人民中國雜誌

4

1970

Vortoj de Prezidanto Maŭ

La revolucia komitato de triflanka kombiniĝo estas kreaĵo de la laborista klaso kaj la popolamasoj en tiu ĉi granda kultura revolucio.

Ni komunistoj ne celas fariĝi estroj, sed fari revolucion; ni ĉiuj devas havi ĝisfundan revolucionan spiriton, sed ne devas disiĝi de la amasoj eĉ je momento.



Vivu nia granda gvidanto kaj la revolucia instruanto de la proletaro Prezidanto Maŭ!

Ili Kreas Novan “Unuagradan Laboron”

Hingguo-gubernio de Gianghi estis laŭdita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ en la periodo de la Dua Enlanda Revolucia Milito kiel modela gubernio, kiu kreis unuagradan laboron. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ “**disvolvi la revolucian tradicion por akiri pli grandan honoron**”, la revolucia komitato de Hingguo-gubernio heredis kaj daŭre konservas la revolucian tradicion kaj konscie komandas ĉion per Maŭzedongpenso.

Por “**esti kaj gvidanto kaj ordinara popolano**”, ĉiu membro de la revolucia komitato intime ligiĝas kun la amasoj kaj persistas en partopreno de kolektiva produktado. Sekvante la ekzemplon de la granda revolucia praktikado de enketado, kiun siatempe faris Prezidanto Maŭ en Ĉanggang-vilaĝo, ili faras profundajn esplorojn kaj enketadon, serioze resumas spertojn kaj detaleme plenumas laboron. Dank’ al tio, en la tuta gubernio regas bonega situacio en la revolucio kaj kreskas la produktado tagon post tago, manifestante la potencon vivipovon de la novnaskita ruĝa regpotenco.


En la loko kie siatempe Prezidanto Maŭ fondis kurson pri agrara revolucio por kadroj, la revolucia komitato de Hingguo-gubernio funkciigas studrondojn pri Maŭzedongpenso por membroj de diversnivelaĵaj revoluciaj komitatoj, heredante kaj disvolvante la bonan lernostilon ligi la teorion kun praktiko, por kiu pledas Prezidanto Maŭ, por forte akceli la ideologian revoluciigon de la gvidantaj grupoj.



Dum sia partopreno de kolektiva produktado Li Zihou (la dua de dekstre), reprezentanto de la Liberiga Armeo en la gubernia revolucia komitato, intime interparolas kun la amaso. Li enportis la bonan tradicion kaj bonan stilon de la trupoj en la revolucian komitaton por plifortigi ĝian revoluciigon.



(Dekstre sube) Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ "sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo", la gubernia revolucia komitato plifortigas la laboron pri milico, starigas la ideon pri preparo kontraŭ milito por esti ĉiam en preteco ekstermi invadantajn malamikojn. Jen membro de la gubernia revolucia komitato revenas de pafekzercado kun la milicanoj de Ĉanggang-komunumo.





Konservante la naturan karakteron de la laboranta popolo, Gong Huihin, membro de la konstanta komitato de la gubernia revolucia komitato kaj reprezentanto de la amasoj, konstante reiras al la produktejo, kie li antaŭe laboris, por partopreni en produktado kaj studado pri produktaj problemoj kune kun laboristoj.

Nepre ne forgesu la klasbatalon. Vicestro de la gubernia revolucia komitato faras analizon pri la nova movdirekto de la klasbatalo kune kun la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj kaj firme tenas la revolucionan amasan kritikadon.



Niaj Partiaj kaj Ŝtataj Kadroj Ĉiuj Estas Ordinaraj Laboruloj

EN la socialisma Ĉinio, la partiaj kaj ŝtataj kadroj ĉiuj estas ordinaraj laboruloj.

Miloj kaj dekmiloj da kadroj sur ĉiuj batalfrontoj kaj en ĉiuj gvidantaj organoj diversnivelaĵoj tra la tuta lando aktive partoprenas kolektivitan produktan laboron de industrio kaj agrokulturo kun sarkilo sur la ŝultro aŭ martelo en la mano, observante la instruon de Prezidanto Maŭ **“Partoprenante kolektivitan produktan laboron, la kadroj tenas plej vastan, konstantan kaj intiman ligan kun la laboranta popolo. Tio estas granda afero de fundamenta graveco por socialisma sistemo; ĝi helpas venki burokratismon kaj preventi reviziismon kaj dogmismon”**. Kaj samtempe milionoj da intelektaj junuloj iris sur montojn aŭ en kamparon kaj grandaj amasoj da loĝantoj de urboj kaj urbetoj partoprenis agrokulturan produktan laboron. Ke laboremo estas glora kaj mallaboremo estas hontinda, jam fariĝis nova moro de nia socio.

LA BONA REVOLUCIA TRADICIO

La partopreno de kadroj en fizika laboro estas bona tradicio de nia partio ĉiam porpledata de Prezidanto Maŭ, kiu senĉese disvolviĝas tra la praktikado de la vastaj amasoj de kadroj.

Frue en la periodo de la enlanda revolucia milito komencita en la jaro 1927, la kadroj de nia partio

kaj Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo jam ofte faris produktan laboron kune kun la amasoj per parto de sia tempo en sia peniga kaj malfacila batalo de profundigo en la kamparon kaj fondado de kamparaj revoluciaj bazoj. Dum sia fizika laboro, ili vaste interligiĝis kun la amasoj, propagandis al ili kaj mobilizis ilin partopreni la revolucion. Dum la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, la armeo kaj la popolo, la kadroj kaj la amasoj, la oficiroj kaj la soldatoj en la kontraŭjapanaj bazoj ĉiuj unuiĝis unuanime kaj disvolvis grandan movadon de produktado. Tiutempe en la revolucia sankta loko Jan-an ofte disaŭdiĝis ĝis profunda nokto bruoj de radŝpiniloj el la kaverndomoj loĝataj de oficejaj kadroj. Per siaj pioĉoj kaj radŝpiniloj, la kontraŭjapanaj armeo kaj popolo frakasis la ekonomian blokadon fare de la japana imperiismo kaj la kuomintanga reakciularo kaj efektivigis la grandan strategian sloganon elmetitan de Prezidanto Maŭ **“Eklaboru mem por akiri sufiĉe da vestoj kaj manĝaĵoj”**. En la granda Libera Milito, la kadroj kaj batalantoj de la Popola Libera Armeo faris fizikan laboron ĉie, kien ili alvenis, kaj tio estis nomata de la amasoj laborstilo de la **“malnova Okavoja Armeo”**.

Per tia produkta aktivado, nia partio kaj armeo profunde enradikiĝis en la popolo, starigis kun ĝi



Ĉen Gingven (maldekstre la dua), vicestrino de la Revolucia Komitato de la Pekina Instrumenta Fabriko, profundiĝas en laborejon kaj partoprenas fizikan laboron kaj samtempe plenumas sian oficon. Jen ŝi studas kun laboristoj ŝlosilan problemon en instrumentparta produkto.

interrilaton tiel intiman kiel tiu inter fiŝoj kaj akvo kaj tre forte mobilizis la milione nombrajn amasojn por konduki la grandan revolucion militon.

En 1949, antaŭvespere de la Liberiĝo de la tuta lando, por preventi estiĝon de fieriĝo kaj memkontentiĝo kaj la tendencoj de halto en antaŭenmarŝo, deziro de ĝuoj kaj nedeziro de peniga vivo Prezidanto Maŭ zorge admonis la tutan partion: **“La kamaradoj daŭre konservu sian stilon de malluksa vivado kaj penema luktado.”** Kaj poste, li plurfoje diris, ke la kadroj devas singardi kontraŭ la malbonaj kutimoj de disiĝo de la amasoj, subjektivismo kaj burokratismo per partopreno de produkta laboro. De la jaro 1957, la Centra Komitato de la Partio kaj la Ŝtata Konsilantaro publikigis specialajn instrukciojn por starigi la sistemon de partopreno de kadroj en fizika laboro kaj ĝin efektiviĝi tra la tuta lando. Sub la zorgo kaj edukado de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio, en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado la vastaj amasoj de revoluciaj kadroj daŭre tenas kaj disvolvas la bonan tradicion de la Partio,

senĉese altigas sian konscion pri partopreno de kolektiva produkta laboro, strikte interligiĝas kun la amasoj kaj gvidas ilin iri la socialismajn vojon.

GRANDA AFERO DE FUNDAMENTA GRAVECO

La partopreno de kadroj en kolektiva produkta laboro estas profunda ideologia revolucio kaj radikala rimedo por opono kaj prevento kontraŭ reviziismo. Por persisti en ĝi, oni devas senĉese batali kontraŭ la miljare malnova penso de la ekspluatantaj klasoj pri malestimo al fizika laboro kaj batali precipe kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma kadra linio de la granda renegato Liu Ŝaŭki. Per sia linio li oponis kontraŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, ke la kadroj nepre devas partopreni fizikan laboron, kun la vana espero korodi la kadrojn per burĝara ideologio, ke ili disiĝu de fizika laboro, de la praktiko kaj de la laborantaj amasoj, forgesu la proprajn kvalitojn de penemo kaj malluksemo de la laborantaj popoloj, fariĝu sinjoroj ĝuemaj

de komfortoj, timantaj malfacilojn kaj alte starantaj super la popolo kaj iom post iom dronu en reviziisman marĉon. Faktoj malkovritaj en la granda kultura revolucio montris al ni, ke iuj kadroj faris eraron de potenctenanto iranta la kapitalisman vojon ĝuste pro tio, ke ili ne elstarigis la proletaran politikon kaj sin disigis de fizika laboro dum longa tempo.

Tre profunda estas tiu historia instruo. Nun la vastaj amasoj de kadroj de nia lando lige kun la praktiko foj-refoje studas la instruon de Prezidanto Maŭ **“La kadroj de niaj partio kaj ŝtato estas ordinaraj laboruloj kaj ne grandsinjoroj rajdantaj sur la nuko de la popolo”**, kaj liajn instruojn pri partopreno de kadroj en kolektiva fizika laboro kaj esti kaj gvidanto kaj ordinara popolano, ripetfoje emfazatajn de li depost la naskiĝo de la revoluciaj komitatoj. Ili komprenas, ke la partopreno de kadroj en kolektiva produkta fizika laboro estas radikala aranĝo elmetita de Prezidanto Maŭ post resumo de la historia sperto de la proletara diktaturo por preventi restaŭron de kapitalismo. Ili decidis antaŭenmarŝi laŭ la brila vojo montrita de Prezidanto Maŭ kaj diligente labori kiel servantoj de la popolo dum la tuta vivo.

En nia lando, la vastaj amasoj de kadroj ĉiuj rigardas la partoprenon de fizika laboro kiel sian devon kaj bonan ŝancon por denova lernado, kaj ili konkure petas permeson iri al fabrikoj, kamparo, limregionoj kaj al la plej malfacilaj lokoj por partopreni klasan batalon, produktan batalon kaj sciencajn eksperimentojn por hardi sian ruĝan koron senlime fidelan al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Ekzemple, en fabrikoj, la laboroj en la kaldronega hejtejo estas la plej malpurigaj kaj lacigaj, sed ĝuste tie estas laborpostenoj, kiujn la gvidantaj kadroj plej ŝatas elekti por si; en kamparaj popolaj komunumoj, oni ofte vidas, ke iliaj kadroj, kadroj sinhardantaj en la kamparo, kaj amasoj kune faras diversajn agrokulturajn laborojn ŝvitegante por fari kontribuon al akiro de riĉa rikolto.

DIVERSAJ FORMOJ DE PARTOPRENO DE KADROJ EN FIZIKA LABORO

Por ke kadroj pli bone kontaktu la laborantajn amasojn kaj ricevu reedukon de la laboristaro kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj dum fizika laboro, oni kreis multajn bonajn formojn



Ĝaŭ Ĝihi (dekstre la unua), membro de la Revolucia Komitato de Pekino kaj sekretario de la partia filio de Nangaŭ-brigado de la popola komunumo “Amikeco inter Ĉinio kaj Albanio”, laboras kun komunumanoj.



Li Ginghi (dekstre la dua), vicesro de la Revolucia Komitato de la Dalian-a Fabriko de Fajrorezistaj Materialoj, ekzamenas kvaliton de produktaĵoj kun laboristoj dum la laborado.

laŭ la diferencaj statoj de la specifaj institucioj, kiam oni organizas, en diversaj lokoj de nia lando, kadrojn partopreni kolektivajn produktajn fizikajn laborojn.

Ekzemple, la kadroj de la ŝtataj oficejoj en la urboj relative facile disiĝas de fizika laboro kaj de la laborantaj amasoj kaj estas infektataj de subjektivisma kaj burokratisma kutimaĉoj. Tiuj oficejoj do serĉas por si fiziklaboran bazlokon en kamparo aŭ landlima regiono, por ke iliaj malsuprenirintaj kadroj estu hardataj en laboro sub la direktado de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj. Tiun formon oni nomas majsepa kadra lernejo. Multaj kadroj, precipe intelektuloj edukitaj en malnovaj lernejoj al kiuj mankas penso kaj sento de laboranta popolo pro longtempa disiĝo de fizika laboro kaj de laboranta amaso, iras kun siaj havaĵoj kaj familianoj rekte al produkta grupo de popola komunumo por

tie longe loĝi, manĝi, labori kaj lerni kune kun malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kaj ricevi reedukon de ili. Tiun formon oni nomas aliĝo al produkta grupo por fiksloĝado. En iuj lokoj, oni organizas kadrojn, instruistojn, medicinajn laborantojn kaj intelektajn junulojn por aliĝi al produkta grupo kolektive. Ĉiuj kadroj en la laborejoj de fabrikoj kaj produktaj brigadoj de la kamparo partoprenas fizikan laboron same kiel la amaso, ne disiĝante de produkto.

Ankoraŭ pli multaj estas la formoj de la partopreno de kadroj laborantaj sur la transporta kaj komerca fronto en fizika laboro. Multaj kadroj de vendejoj kelktempe servas al la aĉetantoj post la vendotablo kune kun la komizoj kaj kelktempe persone portas varojn al la aĉetantoj aŭ iras en la kamparon por aĉeti varojn. Kadroj de transportaj entreprenoj ofte iras kun siaj aŭtotaĉmentoj por plenumi taskon de transporto aŭ eskortado. Ka-

droj de fabrikoj kaj minejoj dum sia partopreno de fizika laboro postulas fiksi por si laborpostenon, deĵortempon, produktokvanton kaj produktokvaliton.

Por certigi, ke kadroj havu necesan tempon por enprofundiĝi en la amasojn kaj efektiviĝi sistemon de partopreno de kadroj en fizika laboro, oni faris reformon al la laboroj de la oficejoj. Ekzemple, oni reduktis la administrajn tavolojn, malmultigis la oficojn samtempe respondecatajn de kadroj, kaj mallongigis kaj reduktis kunvenojn kaj dokumentojn. Multaj gvidantaj organoj praktikis tian sistemon, ke triono de kadroj iras malsupren por partopreni fizikan laboron, triono de ili malsupreniras al bazaj unuoj por fari enketon kaj esploron kaj triono de ili faras la ĉiutagan laboron, kaj la tri partoj alternas periode. Iuj gvidaj organoj praktikis "sistemon de du alternaj grupoj", nome unu parto malsupreniras al baza unuo por partopreni fizikan laboron kaj la alia parto faras ĉiutagan laboron. Aliaj praktikis sistemon de duontaga fizika laboro kaj en iuj aliaj organoj la gvidantaj kadroj de la revolucia komitato iras, ĉiufoje kun parto de la laborantoj sub sia gvido, al produkta grupo por labori kiel komunumano aŭ kiel laboristo en laborejo. La reprezentantoj de amasoj en la revoluciaj komitatoj restas en sia unuo por partopreni produktadon kaj samtempe fari gvidan laboron.

PROFUNDAJ ŜANĜOJ

La vastaj amasoj de kadroj persistas en partopreno de kolektiva produkta fizika laboro. En la laborado ili vive studas kaj vive aplikas verkojn de Prezidanto Maŭ, lernas la bonajn kvalitojn de la laboristaro kaj malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, eliminis diversajn influojn de la burĝara ideologio nekonformajn al la intereso de la popolo, kaj la fizionomio de ilia spirito profunde ŝanĝiĝis.

En la Maj-sepa Kadra Lernejo de Liuhe, Hejlonggiang-provinco de nia lando sin trovas teknikisto, kiu antaŭe okupiĝis pri antaŭdiro de vetero kaj ĉiam deziris fariĝi fama specialisto sed ne zorgis pri la bezonoj de la laboranta popolo. Post sia alveno al la kadra lernejo, li serioze partoprenis kolektivitan produktan fizikan laboron, akceptis reedukon fare de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, iom post iom elkulturis sian ideologion kaj sentimenton de laboranta popolo kaj nur de tiam li povas havi komunan penson kun laboranta popolo. Foje, kiam la gren-rikoltaĵoj

estis sekigataj sur draŝejo, li antaŭdiris en nuba tago post zorga konstato, ke ne pluvos en la nokto. Li maldormis tutnokte pro timo de ekpluvo kaj damaĝo al la sekigata greno sur la draŝejo, sed ne pro timo, ke lia antaŭdiro montriĝos erara kaj lia prestiĝo estos damaĝita.

Multaj junaj kadroj, precipe la junaj intelektuloj, kiuj enoficiĝis post la Liberiĝo, ĝenerale aŭ fundamente ne ricevis hardadon de revolucia milito, amasa batalo kaj produkta fizika laboro, ne komprenas, ke la venko de la revolucio estas malfacile gajnita kaj malhavas ideologion kaj sentimenton de laboranta popolo kaj sperton en praktika batalo. Dum sia partopreno de kolektiva produkta fizika laboro, ili serioze akceptas reedukon de laboristoj, malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, rapide altigis sian konscion pri la klasbatalo kaj la batalo inter la du linioj kaj fariĝas ankoraŭ pli viveplenaj. Ankaŭ maljunaj kadroj reakiris revolucionan junecon en la fizika laboro.

En la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio, parolante pri la nove elektitaj membroj de la Centra Komitato devenintaj el bazaj unuoj, Prezidanto Maŭ sincere instruis: **"Zorgu, ke ili ne disiĝu de la amasoj, ne disiĝu de produktado kaj samtempe laboru."** La prizorgo kaj amo de Prezidanto Maŭ ege kuraĝigas kaj stimulas la vastajn amasojn de kadroj, precipe la gvidantajn kadrojn kaj kadrojn en ofico. Dum sia fizika laboro, ili vaste interligiĝas kun la amasoj kaj faras penetrivajn enketon kaj esploron. Ĉar ili unuiĝas kun la amasoj, ĉi tiuj rigardas ilin kiel siajn intimulojn kaj diras ĉion al ili. Tiamaniere, la kadroj povas kaj ellerni multajn bonajn kvalitojn de la laborantaj amasoj kaj koni iliajn penson kaj postulojn, kaj multajn vivajn konkretajn statojn tiel ke la politikoj, planoj, rezolucioj kaj aranĝoj faritaj de ili estas pli konformaj al la realaĵoj kaj povas pli bone movi la socialisman aktivecon de la vastaj revoluciaj amasoj, ke ili sin ĵetu en la batalon de tenado de la revolucio kaj stimulo de la produkto. Kaj en la loko por partopreno de fizika laboro, iuj kadroj resumas spertojn kaj kulturajn avangardan tipon sinapogante sur la amaso por direkti la laboron de la tuta sfero.

La granda praktiko de partopreno de kadroj en kolektiva fizika produkta laboro kreas armeon de kadroj, kiu ankoraŭ pli intime interligiĝas kun la amasoj, ĉiam estas viveplena, revolucia kaj povanta trapasi la provadon de ĉiaj ajn ŝtormoj kaj ondegoj.

Vigle plena Batala Komandejo

— *Pri la Revolucia Komitato de Gianping-gubernio, Liaŭning-provinco*

JE la 28-a de majo, 1968, la revolucia komitato de Gianping-gubernio glorie naskiĝis en la forta ŝtormo de la Granda Proletara Kultura Revolucio! La gvida grupo de “triflanka kombiniĝo” formita el la reprezentantoj de la revoluciaj gvidaj kadroj, la Liberiga Armeo kaj revoluciaj amasoj plene disvolvas la revolucion stilon de la Liberiga Armeo, la kvaliton de la laboranta popolo penadi sub malfacilaj kondiĉoj kaj la bonan tradicion de nia partio ligiĝi kun la amasoj kaj tiel formis vigleplenan batalan komandejon.

LA REPRESENTANTO DE PLA BONE LUDAS LA ROLON DE “SUBPLOTONESTRO”

Post la fondiĝo de la revolucia komitato de Gianping-gubernio, la reprezentanto de PLA kamarado Daj Juming fariĝis ĝia estro. Li estas veterana batalanto kiu partoprenis la revolucion en la tempo de Kontraŭjapana Rezistmilito. Sekvante Prezidanton Maŭ li militis norde kaj sude dum dekoj da jaroj kaj spertis sennombrajn vivdanĝerojn. Li profunde konas la amaron de senrajteco kaj la malfacilon de akiro de regpotenco, li

sentis ke la grava tasko de tenado de regpotenco metita sur lin estas konfido de la Partio kaj popolo al li, kaj firme decidis fari novan kontribuon en servado al la popolo sur la nova posteno. Li ripetade studis la instruojn de Prezidanto Maŭ pri la konstruo de regpotenco kaj la gravan instrukcion de Vicprezidanto Lin “La gvida grupo estas tre grava, ĝi estas regpotenco mem, estas la ŝtata maŝino”, kaj venis al la kompreno, ke por bone teni la potencon por la popolo de la tuta gubernio, oni antaŭ ĉio devas konstrui fortikan gvidan grupon. Do, la revolucia komitato metas en la unuan lokon antaŭ ĉiuj laboroj fortan tenadon de viva studo kaj viva apliko de membroj de la gvida grupo pri verkoj de Prezidanto Maŭ.

En la komenca periodo post la fondiĝo de la revolucia komitato, en parto de la revoluciaj komitatanoj aperis inklino al malstreĉiĝo en sia laboro. Trovinte tiun simptonon, kamarado Daj Juming organizis la komitatanojn studi la instruon de Prezidanto Maŭ: “Gajni la tutlandan venkon estas nur la unua paŝo en longa marŝo de dek mil lioj.... La ĉina revolucio estas grandioza, sed la vojo post la revolucio estos pli longa, la laboro pli grandioza



Kamarado Ĝu Venlin (maldekstre la tria), vicestro de la revolucia komitato, kune kun ĝiaj aliaj komitatanoj en studrondo de Maŭzedongpenso.

kaj pli peniga.” El la instruo ili ekkomprenis ke la tasko por bone teni kaj bone uzi la potencon por la popolo estas ankoraŭ tre peniga; se oni kontentiĝas jam pri la atingitaj sukcesoj, do ili ne povos gvidi la popolon de la tuta gubernio por daŭre antaŭenmarŝi kaj akiri pli grandajn venkojn. La komitatanoj plie ekzamenis sin laŭ la normo de la spirito “senrezerve” kaj “ekskluzive” servi al la popolo kaj tiel levis sian konscion pri daŭra revolucio sub la proletara diktaturo.

La revolucia komitato de Gianping-gubernio strikte sekvas la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ je ĉiuj paŝoj kaj efektivas ĉiujn liajn plej novajn instrukciojn kaj ĉiujn proletarajn politikojn de la Partio, plene manifestante la potencon vivpovon de la nove naskita regpotenco. Ĉiufoje, kiam nova instrukcio de Prezidanto Maŭ estas publikigita, kamarado Daj Juming tuj organizas la komitatojn serioze studi ĝin por profunde koni ĝian signifon kaj ĝin firme plenumi. Iufoje

en la somero de 1968, kiam publikiĝis nova instrukcio de Prezidanto Maŭ, propagandaj taĉmentoj formitaj el komitatanoj kaj laborantoj de la oficejo de la revolucia komitato tuj iris al kamparo por diskonigi ĝin. Nelonge post ilia ekiro falis torente furioza pluvo, la aŭtoj ne povis plu veturi sur la kotiginta vojo. La taĉmentanoj decidis piediri sub la pluvo. Post plurhora vadado ili fine disportis la voĉon de Prezidanto Maŭ al ĉiu angulo de la tuta gubernio. La malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj emocie diris: “Ni nepre agos laŭ la instrukcio de nia amata Prezidanto Maŭ, kies voĉon vi portas al ni sub tiel granda pluvo!”

Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ “**La plej grava punkto en la reformo de ŝtataj organoj estas intima ligiĝo kun la amaso**”, la revolucia komitato kritikis la venenajn influojn de la absurdaĵoj disvastigitaj de Liu Ŝaŭki en konstruo de la regpotenco, nome: labori per t. n. “regulaj”, gran-

daj kaj komplikaj "institucioj", kaj firme iras la vojon de "elitigo de trupoj kaj simpligo de administrado". El la 18 konstantaj komitatanoj de la revolucia komitato, escepte unu, kiu restas por prizorgi la ĉiutagajn laborojn, la 17 ceteraj kaj parto de la oficistoj de la revolucia komitato estas organizitaj en tri taĉmentojn, por rekte profundigi en bazajn unuojn kaj ricevi spertojn el la elektitaj punktoj, sub la gvido de la estro kaj du vicestroj de la revolucia komitato kamaradoj Daj Juming, Ĝu Venling kaj alia. Prenante hejmojn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kiel siajn oficĉambrojn, ili studas verkojn de Prezidanto Maŭ, kritikis reviziismon, manĝas, loĝas kaj laboras kune kun la amasoj; rapide disvastigante inter la amasoj la tipajn spertojn resumitajn el la amasaj bataloj ĉe la punktoj kaj direktante la laborojn de la tuta gubernio per spertoj ricevataj ĉe la punktoj, ili kreis tute novan situacion en ĉiuj laboroj de la gubernio.

LA VETERANAJ KADROJ REAKIRIS REVOLUCIAN JUNECON

La plejparto el la reprezentantoj de revoluciaj kadroj en la revolucia komitato de Gianping-gubernio estas veteranaj kadroj, kiuj spertis longdaŭran hardon en la revolucio kaj posedas riĉajn spertojn en klasa batalo, kaj estas valora riĉaĵo de la Partio kaj popolo. Tra la rigoraj provoj de la Granda Proletara Kultura Revolucio, multe leviĝis ilia konscio pri klasa batalo kaj batalo inter la du linioj. Pro tio ili ludis spinan rolon en la revolucia komitato, kies vicestro kamarado Ĝu Venling estas tia homo. Li estas aktiva kaj devkonscia en sia laboro, ĉiam elektas por si pli penigan laboron, kuraĝas persisti en principoj, bone scias unuigi kun la aliaj kamaradoj kaj tre zorgas por kulturaj novajn kadrojn en la revolucia komitato.

Foje, dum solvado de problemoj aperintaj en ĝustigo de la laborstilo de la gvida grupo de Gianping-komunumo, pro tro frua eldiro de sia opinio de iu nova kadro de la gubernia revolucia komitato, kiu gvidis la aferon, la problemoj ne povis esti solvitaj. Poste kamarado Ĝu Venling venis al la komunumo, li profundigis en amasojn kaj faris detalajn enketojn kaj studojn, kaj trovis ke la malakordo de opinioj rezultigis el tio, ke iuj kamaradoj taksis erarojn de unu komunuma kadro tro gravaj. Li unuflanke persvadis la amasojn sekvi la instruon de Prezidanto Maŭ ĝuste trakti erarintan kadron; aliflanke li helpis pacience la erarintan kadron levi

sian politikan konscion por koni sian eraron, kaj tiel la lasta faris animtuŝan memkritikon antaŭ la amasoj kaj ricevis ilian pardonon. La agoj de kamarado Ĝu Venling profundigis inter kaj sinapogi sur la amasojn kaj precize plenumi la politikojn de la Partio sen ia ajn deflankiĝo donis al la nova kadro grandan edukon.

Kamarado Ĝu Venling rigardas kulturadon de novaj kadroj kiel sian devon al la revolucio. Li ĉiam varme kuraĝigas ilin labori sentime. Kiam la novaj kadroj atingis sukceson en laboro, li tuj laŭdis ilin entuziasme; kiam ili faris erarojn aŭ havis mankojn en la laboro, li helpis ilin trovi lecionon el tio kaj mem prenis la respondecon pri la eraroj. Foje iu nova kadro, kiu respondecis pri la ĉiutagaj laboroj, donis sankcion al iu neracia elspezo. Poste kiam la amasoj faris kritikon al la revolucia komitato, kamarado Ĝu Venling publike faris memkritikon antaŭ la amasoj. Li diris: "Pro tio ke mi agis ne laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ 'faru revolucion kun ŝparemo', mi devas preni sur min la ĉefan respondecon pri konsento de la neracia elspezo." La ago de kamarado Ĝu Venling profunde edifis tiun novan kadron, ankaŭ li kritikis sin, ke li aŭskultis opiniojn de la amasoj ne kun sufiĉa modesteco kaj esprimis ke en la estonteco li nepre agos laŭ instruoj de Prezidanto Maŭ.

La vicestro de la revolucia komitato de Gianping-gubernio Liu Hingĉang estis vicsekretario de la antaŭa partia komitato de la gubernio. Li estas revolucia veterana kadro kun riĉaj praktikaj spertoj, sed en la pasinteco li nur sidis en sia oficĉambro por telefoni, aŭskulti raportojn kaj tralegi statistikajn tabelojn. Li estis ĉiutage tre okupata, sed ne povis uzi sian tempon sur ŝlosilaj punktoj, pro tio lia direktado al laboroj de la subaj organizoj estis ne efika. Post sia eniro en la revolucian komitaton, li eliris el sia oficĉambro same kiel la aliaj komitatanoj, profundigis en bazajn unuojn, partoprenas kaj gvidas tie la produkton, tiel lia laboro estas multe pli bone farata. En 1968 li iris al Vankjuanŝan-brigado de Maĉang-komunumo por tie gvidi la batalon kontraŭ sekeco kaj trovis kanaleton de tiu brigado senakva. Post pridemando li informigis ke tiu kanaletto devus transpasi iun sufiĉe larĝan kaj profundan valon, kaj la teknika problemo por konstrui la akvedukton ne estas solvita, tial la kanaletto ĝis nun ankoraŭ ne povas alkonduki akvon. Liu Hingĉang pensis en si, ke nepre devas esti konstruita la akvedukto. Li do invitis kelkajn maljunajn spertoriĉajn kamparanojn por kune iri al la valo. Li petis la invititajn kam-

paranojn doni konsilojn kaj samtempe mem cerbumis por skizi projekton. Fine formiĝis praktike realigebla projekto por konstrui la akvedukton. Kune kun la komunumanoj Liu Hingĉang energie laboris sep tagojn kaj du noktojn kaj finkonstruis la akvedukton. Tiel la du partoj de la kanaletoj ne utiligitaj dum kelkaj jaroj interligiĝis, kaj pli ol 200 muoj da kampoj estas irigaciataj. La komunumanoj emocie diris: "Liuĉjo batalas kontraŭ sekeco kune kun ni, funkciante kaj kiel komandanto kaj kiel batalanto. Ni ja bonvenigas tian bonan kadron!"

LA REPRESENTANTOJ DE AMASOJ FARIĜIS PUNTOJ INTER LA REVOLUCIA KOMITATO KAJ AMASOJ

La partopreno de reprezentantoj de amasoj el la industria, agrikultura, kultura, eduka, higiena, financa kaj komerca frontoj en la revolucia komitato de Gianping-gubernio havigis al la nove naskita ruĝa regpotenco vastan amasan bazon. En la lastaj du jaroj, dank' al ilia laboro, la nova regpotenco pli intime ligiĝis kun la revoluciaj amasoj.

El la reprezentantoj de amasoj en la revolucia komitato de Gianping-gubernio, dek kamaradoj funkcias kiel ĝiaj konstantaj komitatanoj. Por

ke ili povu plene ludi sian rolon, la revolucia komitato tiel aranĝas ke ili uzu la plejparton de sia tempo por fari fizikan laboron aŭ plenumi oficon en sia institucio aŭ entrepreno krom parton por deĵori en la revolucia komitato kaj parton por profundiĝi en bazan unuon.

La reprezentanto de amaso kaj konstanta komitatano kamarado Ĝeng Venlong estas laboristo de grena prilaborejo de la gubernio. Elektite en la revolucian komitaton, li ankoraŭ persistas partopreni la produktan laboron. Kiam venas al li la vico por prizorgi la ĉiutagajn laborojn en la revolucia komitato, tage li deĵoras en la revolucia komitato kaj nokte revenas al sia fabriko por labori kun laboristoj de nokta deĵoro. La fabriko estas 4-5 liojn for de la urbo, ĉiufoje, kiam kamarado Ĝeng Venlong venas al la urbo por ĉeesti kunvenon, li ĉiam revenas al sia fabriko tuj post la kunveno, malgraŭ tio, ĉu jam estas profunda nokto aŭ estas vento aŭ pluvo. Li rigardas kunvivadon kun laboristoj kiel bonan ŝancon por propagandi Maŭzedongpenson, intime ligiĝi kun la amasoj, akcepti ilian kontrolon kaj remuldi sian mondkoncepton. La laboristoj laŭdas lin: "Malgranda Ĝeng fariĝis gvidanto, sed agas same kiel ni laboristoj!"



Kamarado Daj Juming (maldekstre), estro de la revolucia komitato petas de la malriĉkampano opiniojn pri laboroj de la revolucia komitato.

Menciante Meng Kinghe, la vicestron de la revolucia komitato de Gianping-gubernio, ĉiuj laŭdas lin kiel bonan reprezentanton de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Elektite en la revolucian komitaton, Meng Kinghe sin postulas pli rigore ol antaŭe. Ĉiufoje, kiam li venas al la gubernia urbo por ĉeesti kunvenon, li ne loĝas en la gastejo, sed tranoktas kune kun laborantoj de la revolucia komitato. Iuj diris al li: "Estas multe pli oportune tranokti en gastejo. La kosto estas ne granda, kaj cetere pagata de la ŝtato. Kion vi domaĝas?" Sed Meng Kinghe ne tiel konsideris la aferon. Li diris: "Ŝpari kelkajn *yuan* por la ŝtato ŝajnas bagatelo, sed konservi la naturon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ja estas granda afero! La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj komisiis min por teni la potencon, sed ne sendas min por ĝui komforton. Se mi ĉasus nur mian personan komforton, mi do apartiĝus de ili kaj forgesus mian devenon.

Kiam li iras al iu ajn komunumo kun tasko, li ĉiam partoprenas produktan laboron kune kun tieaj komunumanoj, kolektas opiniojn pri la revolucia komitato ĉe malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj rapide portas al ĝi la ĝustajn opiniojn. En la aŭtuno de la pasinta jaro, iuj komunumanoj kaj brigadoj trovis, ke ilia rikoltita sorgo ekŝimis kaŭze de prujna difekto. Iu maljuna malriĉkamparano diris al Meng Kinghe: "Vi estas reprezentanto de ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Vi devas raporti tion al la gubernia revolucia komitato, por ke ĝi ekza-

menu, ĉu ankaŭ la sorgo de aliaj brigadoj ŝimas. La greno ja estas trezoro el trezoroj!" Meng Kinghe tuj raportis tion al la revolucia komitato. Ĝia respondeculo konsideris tion tre grava kaj aranĝis disaŭdigon al la tuta gubernio por atentigi ĉiujn pri tio. Samtempe kun tio la revolucia komitato laŭdis ankaŭ tiajn zorgemon al la kolektivo kaj subtenon al la laboro de la revolucia komitato fare de la malriĉkamparano. Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kontente diris: "Niaj reprezentantoj estas senprokrastaj en diskonigo de la politikoj al subaj unuoj kaj kun varma koro por respeguli opiniojn de amasoj al la supera instanco kaj ĉiam staras inter la unuaj vicoj en la revolucio kaj produkto. Kun tiaj homoj por teni la potencon, ni povas esti trankvilaj!"

Senlima estas la nordlanda belo. Novveston portas en Gianping la tero. Dum la lastaj du jaroj, sub la komando de Maŭzedongpensio, kun unueca kono kaj per samtaktaj paŝoj la revolucia komitato de Gianping-gubernio unuigis la tri fortojn en si kaj akiris tre grandajn sukcesojn en gvido de la tutgubernia popolo en teno de la revolucio kaj stimulo de la produkto. La grena produktokvanto de la tuta gubernio en 1969 kreskis pli ol 50 procentojn kompare kun tiu en 1968. Nun, la amasa movado por plie vive studi kaj vive apliki Maŭzedongpensio disvolviĝas prospere en la tuta gubernio. La vastaj revoluciaj popolamasoj decidis batali kontraŭ la klasaj malamikoj kaj naturo por akiri pli grandajn venkojn, uzante Maŭzedongpensio kiel armilon.



Kamarado Daj Juming laboras kune kun komunumanoj.

Hju Jaŭgoŭ — Modelo en Ideologia Revoluciigo

KAMARADO Hju Jaŭgoŭ, membro de la Konstanta Komitato de la Revolucia Komitato de la Ŝanhaja Fabriko de Kaldronejoj kaj reprezentanto de PLA, vere meritas la nomon de bona ekzemplo de daŭra revoluciado kaj modelo en ideologia revoluciigo.

Post sia alveno en la fabrikon, kamarado Hju Jaŭgoŭ ĉiam estas kun tiel alta batalvolo kaj plena de junece entuziasmo, kvazaŭ li havas en si neelĉerpeblan energion, ĉu en tenado de la revolucio aŭ en stimulado de la produkto en ĉiu tago de frua mateno ĝis malfrua nokta horo. Kamarado Hju Jaŭgoŭ estas tia homo kiu neniam scias lacigon. Oni eĉ neniel povas imagi al si, ke li estas veterana batalanto, kiu estis operaciita pro stomaka kancero kaj persiste daŭrigas sian laboron spite al la malsano.

I

En printempo de 1964, kamarado Hju Jaŭgoŭ, departementestro de iu trupo de la Orientmara Floto, subite malsaniĝis. La stomako doloris al li kaj sangadis senĉese. Li enhospitaliĝis. Kuŝante sur la lito li premis la stomakon per sia pugno kaj forte mordis la lipon por ne ellasi eĉ ĝemeton. Vidinte, ke la kuracistoj kaj flegistoj en la malsanula ĉambro flustradis unu al alia kun streĉa mieno, kamarado Hju Jaŭgoŭ sciis en si, ke li eble suferas de nekuracebla malsano kancero.

Kamarado Hju Jaŭgoŭ sidiĝis kaj diris serene: “La plej alta devo de ni kompartianoj estas oferi nian vivon por la Partio! Vi devas diri al mi la veron!

“Se mi suferas de kancero, vi devas sciigi min pri tio! Por konkeri tiun ĉi fortikaĵon, ne sufiĉas

la klopodoj de la kuracaj laborantoj, sed estas necesa ankaŭ kuna agado de la paciento!”

La kuracistoj estis kortuŝitaj de liaj vortoj kaj diris firme premante lian manon: “Kamarado Hju! Vi suferas de stomaka kancero kaj estas necese tuj ĝin amputi!”

Kamarado Hju Jaŭgoŭ alfrontis severan provon! Kuŝante sur la lito, li longe ne povis endormiĝi kaj aperis antaŭ liaj okuloj la suferplenaj jaroj de lia infaneco kaj la batalado dum lia juneco. Kamarado Hju Jaŭgoŭ laboris kiel metilernanto kaj bovpaŝtisto de sia infaneco kaj estis turmentita de ĉiaj suferoj. En la jaro 1940, li aliĝis al la Okavoja Armeo kaj travivis la malfacilajn jarojn de la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Liberiga Milito. En la pasintaj 29 jaroj, sub la nutrado de Maŭzedongpenso, li batalis sen timo al malfaciloj kaj al morto, laboris diligente kaj zorgeme kaj estis multfoje honore laŭdita kaj premiita pro siaj meritaj faroj. Nun li rigardis la portreton de Prezidanto Maŭ, kaj torento da vortoj ŝprucis el lia koro: “Ho, Prezidanto Maŭ! Prezidanto Maŭ! Mi neniam haltos duonvoje en la revolucia batalo! Mi ankoraŭ batalados strikte vin sekvante por tute enterigi imperiismon, reviziismon kaj la reakciularon!”

Dum amputo de la kancero, kamarado Hju Jaŭgoŭ emocie diris, rigardante la streĉan vizaĝon de la kuracistoj: “Komencu do. Tute ne grave — se vi sukcesos, mi revoluciados daŭre; se la operacio malsukcesos, vi tamen povos ricevi sperton el tio, kaj akiros bazon por sukceso en la estonteco.” Tia nobla revolucia spirito de li tre kortuŝis la ĉeestantojn.

Sukcesis la operacio kaj la kunbatalantoj tre ĝojiĝis pro la venko. Sed la kuracisto skribis

pri li la konkludon de "perdo de la laborkapablo". Kamarado Hju Jaŭgoŭ ne estis timigita de tiu konkludo, kaj kun superhoma persistemo li faris penigan kaj malfacilan korpekzercadon. Post du monatoj, li sukcesis konvinki la kuraciston, reiris al la fronto kaj petis permeson partopreni batalon. Kamarado Hju pensis: Mi batalos por la revolucio, se nur mia koro ankoraŭ batos; kaj mi finos mian vivon per batalo, se mi devos oferi la vivon!

II

La fajro de la Granda Proletara Kultura Revolucio ekflamis tra la tuta lando. En marto de 1967, Hju Jaŭgoŭ venis dorsportante tornistran al la Ŝanhaja Fabriko de Kaldronegoj por subteni maldekstrulojn kaj poste fariĝis membro de la konstanta komitato de la revolucia komitato de la fabriko.

Foje li ĉeestis kunsidon kunvokitan de la urba revolucia komitato por diskuti la problemon de fabrikado de 125,000-kilovata vaporturbina generatoro kun duobla akva interna malvarmigo. En la kunsido, li meminiacie prenis, en la nomo de la kaldronega fabriko, la taskon de fabrikado de 400-tuna kaldronego. En la mobiliza mitingo de la tuta personaro de la fabriko li diris: "Imperiismo, reviziismo kaj la reakciularo kalumnias kaj atakas la Grandan Proletaran Kulturen Revolucion de nia lando. Ni rebatu la mensogojn de la malamikoj per nia praktika aktivado kaj nepre elfaru 400-tunan kaldronegon!"

Dum farado de la 400-tuna kaldronego, kamarado Hju Jaŭgoŭ bataladis kune kun la laboristoj tage kaj nokte sur la plejfronto de produktado. Foje, kiam li studis verkon de Prezidanto Maŭ en meznokta horo sidante sub lampo, forte agitiĝis liaj pensoj: Longa estas la batala vojo de la revolucio kaj tre tre multaj estas la laboroj farendaj por ni. Sed ja tro nesufiĉas la klopodo de sola homo, kiom ajn grandan kapablon li havas kaj kiom ajn da laboroj li povas fari por la Partio! Li sentis, ke la plej grava afero por fabrika 400-tunan kaldronegon ne estas la pretigo de bluplanoj kaj ŝtalaĵoj, sed armi kaj firme unuigi la vastajn amasojn per Maŭzedongpenso, kaj tiam 400-tuna, 800-tuna, 1000-tuna. . . ĉia ajn miraklo en la homa mondo povas esti kreita.

Estis frosta tago kun siblanta norda vento. La stomaka malsano revenis al kamarado Hju



Kamarado Hju Jaŭgoŭ

Jaŭgoŭ kaj ŝveliĝis liaj vizaĝo kaj gamboj. Tiu-tage oni okupiĝis pri instalo de giganta kurbigilo de ŝtalplatoj por la farado de la 400-tuna kaldronego. Kamarado Hju Jaŭgoŭ bone sciis la gravan signifon de tiu laboro. Li ne iris al kuracejo pro sia malsano, sed iris al la konstruejo spite al la frosta vento kaj sin ĵetis en la streĉan batalon.

Sub la direktado de Maŭzedongpenso kaj en strikta unuigo, kamarado Hju Jaŭgoŭ kaj la laboristoj kaj revoluciaj teknikaj laborantoj de la Ŝanhaja Fabriko de Kaldronegoj sukcesis projekti kaj fabrika la unuan 400-tunan kaldronegon de nia lando en nur tre mallonga tempo.

III

En iu somermeza mateno, kamarado Hju Jaŭgoŭ kaj iu ĉ. dudekjara junulo interparolis, sidante vizaĝ-al-vizaĝe. Vidante tion, laboristoj de la fabriko jam komprenis, ke maljuna Hju estas helpanta la junan kadron per admono. Li diris sincere kaj intime: "Dank' al kuna batalado

de la revoluciaj amasoj de la tuta fabriko, la 400-tuna kaldronego estis sukcese elfarita, kaj la situacio en la fabriko estas senprecedence bona. Sed la klasbatalo ja ne finiĝis. Kial ankoraŭ iuj kroĉiĝas al 'administrado de fabriko per specialistoj'? Kial iuj timas preni sur sin respondecon, timas malfacilojn kaj ne plu volas fari penigajn laborojn? Kaj kial iuj kamaradoj fariĝis fieraj pro siaj sukcesoj, sintenas kiel meritoplenaj gravuloj, ne aŭskultas la opiniojn de la amasoj kaj agas arbitre? Ĉio ĉi tio ja estas spegulaĵo de la klasa batalo, kamarado. . ." Aŭdinte tion, la juna nova kadro stariĝis kun tre ruĝiĝinta vizaĝo: "Ne plu diru, maljuna Hju, mi jam komprenas. Mi fieriĝis pro sukceso, malbone influis la unuiĝon interne de la revolucia komitato kaj malintimigis la rilaton inter la kadroj kaj la amasoj. Iru kun mi al la amasoj, ke mi faru memkritikon inter ili."

Kun la brile ruĝa revolucia trezora libro en siaj manoj, ili vizitis laborejon post laborejo por aŭskulti opiniojn de la amaso kaj petis kritikojn de la laborgrupoj unu post alia. Rigardante

ilin forirantajn, iu maljuna laboristo diris kun profunda sento: "Havante tiajn potenctenantojn, ni en la koro ne ĝeniĝos de zorgoj."

Tiel bone kamarado Hju Jaŭĝoŭ zorgas pri la kreskado de la novaj kadroj en ĉiu afero. Li profunde sentis: "La vivo de homo estas limigita, dum la revolucia afero estas senlima. Elkulturo de novaj kadroj senlime fidelaj al Prezidanto Maŭ kaj bone tenantaj kaj uzantaj la regpotencon de la proletaro estas afero de fundamenta graveco por la proletara revolucio por cent, por mil, eĉ por dekmil jaroj."

Renkontinte malfacilojn en sia laboro, iu nova kadro jam intencis forlasi sian postenon, kaj tiam kamarado Hju Jaŭĝoŭ admonis lin paciencie: "Nia hodiaŭa regpotenco ja estas malfacile akiritita! La martiroj malfacilege batalakiris la regpotencon je la kosto de siaj kapoj kaj sango. Se ni deziras tuj retroiri pro renkonto de malfaciloj, ĉu ni agas inde je la espero de Prezidanto Maŭ, de la revoluciaj martiroj kaj de la amasoj?"

Kamarado Hju Jaŭĝoŭ ekzamenas la memfabrikitan tubokurbigan maŝinon.



Tio, kion diris kamarado Hju Jaŭgoŭ, vorton post vorto penetris en la koron de la kadro! Tiu ĉi estis forte emociita kaj diris kun larmoj: “Kamarado reprezentanto Hju, mi nepre ĉiam restos fidela al Prezidanto Maŭ kaj ĉiam revoluciados!”

En la ordinara tempo, maljuna Hju celkonscie helpadas veteranajn kadrojn kaj stimulas ilin labori kuraĝe. Kiam ili atingis sukcesojn, li energie diskonigis tion inter la amasoj; kiam ili faris ion ne bone aŭ erare, li meminciate prenis sur sin la respondecon anstataŭ ili. Dank’ al la kolektiva penado de kamaradoj, baldaŭ jam plene disvolviĝis la aktiveco de la novaj kaj malnovaj kadroj de la tuta fabriko, la membroj de la revolucia komitato pli bone unuiĝis, pli intimiĝis la rilato inter la kadroj kaj la amasoj kaj la nove naskita revolucia regpotenco pliapaŝe solidiĝis.

Kamarado Hju Jaŭgoŭ ne nur instruadas la novajn kaj malnovajn kadrojn per vortoj, sed ankaŭ ilin edifas per siaj modelaj agoj en ĉiuj aferoj. Iunokte, kamarado plenumanta taskon

en alia loko sciigis per telefono, ke tie oni havas malfacilojn en faro de iu parto de kaldronego kaj esperas, ke la fabriko solvos por ili tiun problemon. Informiĝinte pri tio, kamarado Hju Jaŭgoŭ tuj rapidis al laborejo por okazigi tiunokte kunvenon ĉe la loko. Li diris: “Ni nepre devas plenumi tiun ĉi taskon kaj ne devas influi la tenadon de la revolucio kaj stimulon de la produkto.” Li interkonsiliĝis kun la aliaj tra la tuta nokto kaj batalis kune kun la laboristoj-kamaradoj dum la tuta sekvanta tago. Oni admonis, ke li iru ripozi, sed li diris: “Oni povas ripozi pro malbona farto, sed la revolucia afero progresas flugrapide, mi do ne devas paŭzi! La devo de gvidantoj ja estas helpi la amasojn per ideoj kaj batali kune kun ili.” Kaj plenuminte tiun taskon, li iris ankaŭ al alia laborejo por vidi la kamaradojn en nokta deĵoro. Sciinte, ke kamarado Hju Jaŭgoŭ jam daŭre laboradis dum pli ol 30 horoj, la veteranaj laboristoj tiel kortuŝiĝis, ke ili ne povis trovi taŭgajn vortojn por sin esprimi.



Kamarado Hju Jaŭgoŭ faras koverŝan interparolon kun kadroj.



Kamarado Hju Jaŭgoŭ organizas teknikajn laborantojn por disvolvi amasan kritikadon por altigi ilian klasan konscion.

Sub la nutrado de Maŭzedongpenso kaj stimulo de la modela agado de kamarado Hju Jaŭgoŭ kaj aliaj reprezentantoj de PLA, la novaj kaj malnovaj kadroj de la tuta fabriko meminitate kaj memkonscie kondukas revolucion kaj estas rigoraj al si mem por doni bonan ekzemplon en daŭra revoluciado. Sub la influo de la modelaj agoj de la gvidantaro, tajde iras la revolucio kaj prosperas la produkto de la tuta fabriko.

IV

Pro longtempa tro laciga laborado, kamarado Hju Jaŭgoŭ pli kaj pli malgrasiĝis. Sed li persiste laboras kiel antaŭe.

Preskaŭ ĉiuj laborantoj de la tuta fabriko scias, ke kamarado Hju Jaŭgoŭ trinkas tre multe da akvo, ili tamen ne scias, ke tio ĝuste montras lian revolucion spiriton de sentimeco al malfaciloj kaj al morto! Kvar kvinonoj de lia stomako estas amputita, li povas preni ĉiufoje nur 1-2 uncojn da manĝaĵo kaj la kuracisto diris, ke lia stomako postulas, ke li manĝu multfoje en ĉiu tago kaj prenu malmulte da manĝo en ĉiu fojo. Li pensis, ke li devas agi aŭ tiel, ke lia korpo akomodiĝu al la cirkonstancoj por daŭre revolucii, aŭ tiel, ke

li iros hejmen por ke la cirkonstancoj konformu al la bezono de lia sano — aŭ tiel ke enradikiĝu la burĝara egoismo aŭ tiel ke fruktodonu la proletara kolektivismo, oni devas elekti unu el la du nepacigeblaj. Li decidis akomodi sin al la cirkonstancoj por daŭre revolucii.

Iuj admonis kamaradon Hju Jaŭgoŭ iri hejmen por ripozi por kelka tempo.

Tion aŭdinte, maljuna Hju sentis, kvazaŭ li estus devigita tuj forlasi la fabrikon kaj starigis maltrankvile kaj diris el sia koro: “Mi ja ne povas forlasi la fabrikon. Se nur mia koro ankoraŭ batas, mi devas daŭrigi la revoluciadon!”

Kiam revoluciulo estas stariginta proletaran mondkoncepton de kompleta kaj senrezerva servado al la popolo, li povas igi ĉiun sekundon de sia vivo produkti fortan brilon. Ĝuste tia estas kamarado Hju Jaŭgoŭ, kiu estas sturmanta heroo en batalejo kaj pioniro en luktado kontraŭ malfaciloj, kiel do nun la bagatela malsano povus venki lin! Ĉiam kamarado Hju Jaŭgoŭ estas plenumanta sian noblan ĵuron: “Mi batalos por la revolucio, se nur mia koro ankoraŭ batos; kaj mi finos mian vivon per batalo, se mi devos oferi la vivon!”

Maljuna Tan Estas Bona Reprezentanto de Malriĉkamparanoj kaj Malsuperaj Mezkamparanoj

KAMARADO Tan [Kingsong estas membro de la konstanta komitato de la revolucia komitato de Hianghiang-gubernio, estro de Dongping-grupo de Dongŝan-komunumo kaj membro de la Komunista Partio. Post sia partopreno de la gvida laboro de la gubernia revolucia komitato, li firme tenas en sia koro la grandan instruon de Prezidanto Maŭ “**esti kaj gvidanto kaj ordinara popolo**”, neniam disiĝas de la amasoj kaj ĉiam restas penema kaj malluksema kaj konservas la proprajn kvalitojn de la laboranta popolo. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj laŭde nomas lin sia bona reprezentanto.

MODELO EN PRODUKTA LABORO

Post kiam maljuna Tan partoprenis la revolucian komitaton de triflanka kombiniĝo, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris kun fiero: “La reprezentanto de ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj estas elektita kiel membro de la revolucia komitato. Tio ĉi signifas la plej grandan fidon de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ al ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj!” Sed iuj timis, ĉu maljuna Tan fariĝos “**oficista moŝto**” en la urbo, formetinte sian sarkilon.

Tiam ankaŭ en la kapo de maljuna Tan bolis multaj pensoj. La patro de Tan Kingsong mortis antaŭ lia naskiĝo, kaj lia patrino mortis kiam li

estis ĉ. dekjara. Li, kiu en la malnova socio sin vivtenis per sovaĝaj legomoj kaj spertis ĉiajn suferojn en sia knabeco, nun povas partopreni la revolucian komitaton de triflanka kombiniĝo. Tio ĉi ja estas rezulto de la flegado de Prezidanto Maŭ. Li decidis gajni gloron por la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj gajni gloron por Prezidanto Maŭ. En la unuaj tagoj post sia komitataniĝo, kun tiu penso li foj-refoje studis la grandajn instruojn de Prezidanto Maŭ “**Estas necese persisti pri la sistemo de partopreno de kadroj en kolektiva produkta laboro. La kadroj de niaj partio kaj ŝtato estas ordinaraj laboruloj kaj ne grandsinjoroj rajdantaj sur la nuko de la popolo.**” “**La komunistoj ne celas fariĝi estroj sed fari revolucion.**” Ju pli multe li studis tiujn instruojn, des pli klariĝis liaj pensoj kaj okuloj, kaj des pli li akre sentis, ke li ne devas sin disigi de laboro, de la amasoj kaj de la praktiko eĉ je momento. Li skribis en sia notlibro: “**Ŝanĝiĝis mia pozicio, sed ne devas ŝanĝiĝi mia persistado en partopreno de kolektiva produkta laboro, ne devas ŝanĝiĝi miaj sentimentoj de malriĉkamparano kaj malsupera mezkamparano, ne devas ŝanĝiĝi mia stilo de penemo kaj malluksemo kaj ne devas ŝanĝiĝi mia ruĝa koro eterne fidela al Prezidanto Maŭ.**”

El la tri nedisiĝoj nome nedisiĝo de fizika laboro, nedisiĝo de la amasoj kaj nedisiĝo de la praktiko, la unua nedisiĝo estas la plej fundamenta. Disiĝinte de fizika laboro, oni nature disiĝas de

la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, disiĝas de la revolucio kaj sekve jam ne rajtas reprezenti la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn. Kiel kamarado Tan Kingsong pensis, ankaŭ tiel li agas. Escepte de kiam li aktive partoprenas gravajn kunvenojn de la revolucia komitato, li ĉiam persistas partopreni kolektivitan produktan laboron kune kun la komunumanoj. Eĉ kiam li iris al la gubernia urbo por ĉeesti kunvenon, li ne piediris la vojon senfare; li kutime portas paron da korboj per vekto kaj revenante de kunveno li senescepte portas du korbojn da fekaĵo aŭ cindro kaj balaaĵo kiel sterko. En iu nokto de decembro, 1968, muĝis norda vento kaj torentis pluvego, kiam finiĝis la kunveno de la gubernia revolucia komitato; malgraŭ la pluvego kaj la vento ĝisoste frosta maljuna Tan portis kiel kutime al la brigado du korbojn da karbocindro.

Foje en printempo de 1969, kiam Tan Kingsong revenis de kunveno en la provinca ĉefurbo, jam estis krepuska vesperiĝo. Vidante, ke komunumanoj intense okupiĝas pri portado de ŝlimo el la lageto, li tuj metis sian pakaĵon sur la digo, prenis fosilon kaj eklaboris kune kun la komunumanoj. "Jam estas malfrue, maljuna Tan," oni admonis lin. "Vi jam sufiĉe laciĝis de tiel longa piedirado, do iru hejmen por iom ripozi!" Maljuna Tan respondis: "Neniom da laco mi sentas; ekpreninte la fosilon mi tuj sentas min energiplena."

De kiam li fariĝis estro de produkta grupo en 1961, maljuna Tan plenumis laborkvanton de 3,000 laborpoentoj en ĉiu jaro kaj neniam akceptis rekompencajn laborpoentojn de la brigado pro sia laboro por kolektivo. Post sia partopreno al la gubernia revolucia komitato, li faras produktan laboron ankaŭ ne malpli multe ol la aliaj. Konsiderante ke li estas aĝa kaj multe okupata de komunaj aferoj kaj laboroj, komunumanoj admonis, ke li faru malpli multe da laboro por la produkta grupo. Tamen li diris al ili kun rideto ĉiufoje: "Kvankam mi maljuniĝis, sed mia penso por daŭre revolucii ne devas maljuniĝi! Rustiĝas glavo, se oni ne akriĝas ĝin, reviziistiĝas homo, se li ne faras fizikan laboron."

MODELO EN DAŬRA REVOLUCIADO

Depost kiam Tan Kingsong prenis sur sin gvidan laboron en la revolucia komitato, li ĉiam metas en la unuan lokon la gvidadon de la vastaj amasoj por studi kaj propagandi Maŭzedongpenson. Li

kondukis la vastajn amasojn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj aktive respondi al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ "tenis la revolucion, stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito" kaj antaŭen marŝi decide kaj grandpaŝe laŭ la socialisma ŝoseo.

Nokte en decembro, 1968, kiam li kunvenis en la gubernia urbo, la ruĝa radio alportis la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ. Tiam li pensis, ke la plej nova batala ordono de Prezidanto Maŭ estas lumturo por la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en ilia antaŭenmarŝo kaj nepre devas esti komunikita al ili kiel eble plej rapide. Li do en tiu sama nokto venis al Dongŝan-lernejo trans Lianŝuj-rivero kaj Dongŝan-monto, por organizi propagandajn taĉmentojn kune kun la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj. Ili transdiris la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ de domo al domo, kaj nur post la dua horo en profunda nokto maljuna Tan revenis al sia hejmo. Vidante ke lia tuta korpo makuliĝis de koto, lia edzino diris zorge: "Aŭskultu min: revolucion vi devas fari, sed pri via sano vi ankaŭ devas iom zorgi!" Maljuna Tan diris al sia maljuna edzino kun rideto: "Vi devas zorgi pri la ŝtataj aferoj kaj zorgi pri la plej nova instrukcio de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Nur tiel agante vi vere zorgas pri mi!"

Por ne disiĝi de la praktiko, plej grave estas ne disiĝi de la tri grandaj revoluciaj movadoj. En klasa batalo, kamarado Tan Kingsong estas senŝanceliĝa sur sia klasa starpunkto, klare distingas la malamikojn de la kamaradoj kaj kuraĝas batali. En printempo de 1968, por detruiri la bredadon de porkoj de la kolektivo, klasaj malamikoj disemis la absurdan aserton, ke "en kolektiva bredado de porkoj, profitas la ŝtato, sed malprofitas la komunumanoj". Rimarkinte tion, maljuna Tan enloĝiĝis en la porkobredejon. Unuflanke li edukis la brediston, ke li bone bredu la porkojn por la revolucio, kaj aliflanke li profunde mobilizis la amasojn, elfosis la klasajn malamikojn, kiuj malice incitis la amasojn sin kaŝante en mal-luma angulo, faris solidan kritikon kontraŭ ili en ligo kun ilia nigra mastro la granda renegato Liu Ŝaŭki, kaj per tio forte batis la frenezan atakon de la klasaj malamikoj kaj firmigis la socialisman kolektivitan ekonomion. En tiu jaro, krom bone plenumi sian devon de pago de imposta greno kaj vendo de greno de bona kvalito al la ŝtato, ili ankaŭ vendis al ĝi pli ol 20,000 kilogramojn da superflua greno kaj 48 grasajn porkojn.

Kamarado Tan Kingsong estas ne nur avangarda batalanto vive plena, kiu gvidas la vastajn revoluciajn amasojn batali kontraŭ la klasaj malamikoj, sed ankaŭ estas antaŭiranto, kiu kuraĝas transformi la naturon en produkta batalo. Post sia partopreno de la gvida laboro de la revolucia komitato, li batalas sur la plejfronto en produkto same kiel antaŭe kaj estas polvoplana en serena tago kaj kotplena en pluva tago. En vintro de 1968, spite al neĝblovado li gvidis komunumanojn porti pli ol 8,000 korbojn da sablo el Lianŝuj-rivero, per kio ili rebonigis pli ol 40 muojn da gluecaj kampoj, ebenigis pli ol 30 muojn da kampoj kaj fosis irigaciajn kanaletojn kun longeco de pli ol 1,000 metroj. Dank' al grandskala akvoutiliga konstruado kaj fundamenta konstruado de la kampoj, Dongping-grupo ricevis grandegan ŝanĝon. En 1968, la pomua produktokvanto atingis 560 kilogramojn kaj la rikolto de 1969 estis ankoraŭ pli riĉa ol tiu de 1968.

KORA INTIMULO DE LA MALRIĈKAMPARANOJ KAJ MALSUPERAJ MEZKAMPARANOJ

Post sia partopreno de la gvida laboro de la gubernia revolucia komitato, kamarado Tan Kingsong firme tenas en sia memoro la grandan instruon de Prezidanto Maŭ **“La kamaradoj daŭre restu modestaj, singardemaj, liberaj de aroganteco kaj senpacienco en sia laborstilo; la kamaradoj daŭre konservu sian stilon de modesta vivado kaj penema luktado”**, kaj ankoraŭ pli strikte ligis sian koron kun tiu de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.


Maljuna Tan tenas en sia koro nur la ŝtaton, la kolektivon kaj la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn, sed nur ne sin mem. De 17 jaroj, li ĉiam dorsportas la flavan sakon kiun li portadis sur la korea batalejo. Maljuna Tan ofte diris al siaj familianoj: **“Riĉan rikolton ni akiris kaj la vivo pliboniĝis, sed ni ne devas forgesi la malfacilan tempon de la malnova socio kaj ne forgesi, ke du trionoj de la loĝantaro de la mondo ankoraŭ ne liberiĝis. Se ni zorgas nur pri plibonigo de manĝo kaj vestaĵoj, ni forgesos nian devenon, forgesos la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn, kaj forgesos la revolucion.”** Sub la edukado de maljuna Tan, lia familio vivas kun laboremo kaj ŝparemo. En la pasintaj kelkaj jaroj, ĝi elŝparis pli ol 6,000 kilogramojn da greno kaj ilin vendis al la ŝtato. Kiam li vidis, ke la domo de malriĉkamparanino

de la najbara grupo Ĉen Fujing enlasas pluvakvon, li tuj ĝin riparis kun siaj du filoj. Kaj li aĉetis por ŝi bezonatajn materialojn per sia propra mono. Ĉen Fujing kortuŝiĝis ĝis larmoj kaj diris dankeme: **“Maljuna Tan, vi estas tiel zorgema al ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kiel mi povas esprimi al vi miajn dankojn!”** Maljuna Tan diris: **“Estas Prezidanto Maŭ, kiu savis nin malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn el la maro de mizeroj, vi devas danki Prezidanton Maŭ!”** Rigardante la brilan portreton de Prezidanto Maŭ, ŝi laŭte kriis emocie: **“Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!”**

Tio ja ne estas sola kazo de lia zorgado pri la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. En printempo de 1968, kiam li rimarkis ke iu komunumano estas en malfacilo, li tuj portis al li 50 kilogramojn da rizo. Kiam malriĉkamparano de najbara produkta grupo Feng Giaming malsaniĝis, li donis al li kvanton da mono kaj greno, por ke li ricevu kuracadon. En aŭgusto de 1969, maljuna Tan informiĝis en profunda nokto, ke du junuloj de la grupo estas venenitaj pro neatento en uzado de insekticido, li kuris flugrapide al hospitalo por venigi kuraciston kaj flegadis la malsanulojn dum la tuta nokto post sia reveno, kaj forlasis ilin nur post kiam ili eldanĝeriĝis. Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris tre emocie: **“Maljuna Tan metas sian tutan zorgon por la bonoj de la kolektivo, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj por aliuloj!”**

La avangardaj faroj de kamarado Tan Kingsong en persistado pri nedisiĝo de fizika laboro, nedisiĝo de la amasoj kaj nedisiĝo de la praktiko profunde kortuŝis la vastajn amasojn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ili diris: **“Post sia partopreno de la gubernia revolucio, maljuna Tan strebas kune kun ni al la sama celo, ŝvite laboras kune kun ni kaj ligas sian koron strikte kun la nia. Havante tian homon por tenadi la potencon por ni, ni vere estas liberaj de maltrankvilo!”** En marto de 1969, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj unuvoĉe elektis lin kiel reprezentanton al la Kunveno de Reprezentantoj de Aktivuloj en Viva Studo kaj Viva Apliko de Maŭzedongpenso de la provinco kaj en la fino de septembro ili elektis lin kiel reprezentanton de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por ĉeesti la celebran solenon de la dudeka datreveno de la Nacia Festo kaj li plej feliĉe vidis nian grandan gvidanton Prezidanto Maŭ.

Nova Venko Akirita en Rekunigo de Rompita Membro Dank' al Maŭzedongpenso



La ĥirurgiaj laborantoj de la 230-a hospitalo sukcese kreis miraklon de la rekunigo de la tri partoj de la rompita brako, timante nek malfacilojn kaj kuraĝante fari praktikon.

La revoluciaj kuracaj laborantoj de la Ĥirurgia Sekcio de la 230-a hospitalo de iu trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpenso en la artikolo Memore al Norman Bethune. Dank' al la ĉiamvenka Maŭzedongpenso ili plurfoje sukcesis rekunigi rompitaĵn brakon, manplaton kaj kruron. La dekstra brako de Li Ŝufang, laboristo de Donggoŭ-gubernia Agrikulturila Fabriko de la urbo Dandong, estis torde rompita de la maŝino en tri partojn pro neatentemo dum la riparado. Sekvante la brilan instruon de Prezidanto Maŭ "ekstreme respondecema sento al la laboro kaj ekstreme varma koro al kamaradoj kaj la popolo", la ĥirurgiaj laborantoj de la 230-a hospitalo sukcesis rekunigi la rompitan brakon de Li Ŝufang post operacio de pli ol 9 horoj kaj tre zorga flegado de pli ol 5 monatoj. Tio estas granda sukceso akirita per la penso de la brilaj "tri popularaj artikoloj" kaj granda venko de la proletara kuraca kaj higiena linio de Prezidanto Maŭ.



La vicestro de la ĥirurgia sekcio kamarado Liang Kĭ-peng (dekstre la dua), kiu ĉefe respondecis pri la operacio por rekunigi la tri partojn de la rompita brako, esploras kun siaj kamaradoj la novan teknikon pri rekunigo de rompita brako.

Post la tuta resaniĝo de kamarado Li Ŝufang, ĥirurgiaj laborantoj de la 230-a hospitalo ankoraŭ ofte ekzamenas zorgeme movkapablon de lia rompita brako.



Post reviviĝo de la rompita brako, kun profunda proletara amo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, Li Ŝufang emocie surskribis jenajn vortojn: "Ĉiam fidela al Prezidanto Maŭ!"



Dankojn al Nia Savanto

Prezidanto Maŭ

NIA Hinlian-brigado situas en neĝmonta valo sur Diking-altebenejo de Junnan-provinco ĉe la sudokcidenta limo de nia patrolando. La 1213 membroj de la 221 familioj de la brigado ĉiuj estas tibetanoj. Laŭ la granda instruo de Prezidanto Maŭ “**sinapogi sur propraj fortoj**”, “**peneme lukti en malfaciloj**” kaj “**lerni de Daĝaj en agrikulturo**”, ĉiuj liberigintaj servutuloj de nia brigado batalis kontraŭ la klasaj malamikoj, kontraŭ la naturo kaj akiris unu venkon post alia kaj unuapaŝe ŝanĝis la fizionomion de malriĉeco kaj postiĝinteco de nia loko.

Antaŭ la Liberiĝo, ni suferis de plej reakciaj, plej mallumaj kaj plej kruelaj subpremado kaj ekspluatado de la feŭda servuta sistemo. Ne nur la montoj kaj kampoj sed ankaŭ la servutuloj estis posedaĵoj de la servutulaj mastroj. La vastaj amasoj de servutuloj havis buŝon, tamen ne povis paroli; ni havis piedojn, tamen ne povis libere iri. Ni penlaboris sub steloj kaj la luno kaj rikoltis dekmilojn kaj centmilojn da kilogramoj da sekalo, ni tamen devis manĝi poligonajn ŝelojn kun neĝakvo; ni teksis grandan kvanton da lanteksaĵo, tamen ni portis sur ni nur linan ĉifonon; ekzistis miloj kaj dekmiloj da vojoj grandaj kaj malgrandaj, sed estis neniu vivvojo por la servutuloj.

Ruĝis la oriento, leviĝis la suno. En printempo de 1951, Prezidanto Maŭ sendis al Diking-altebenejo karajn PLA-anojn. La brilo de Prezidanto Maŭ lumigis la valon neĝmontan, la liberigitaj servutuloj fariĝis mastroj. Ni organizis milican roton, prenis pafilojn por revolucio, subpremis la ribelajn banditojn en kunagado kun la Ĉina Popola Liberiga Armeo, ĝisfunde renversis la reakcian feŭdan servutan sistemon kaj efektivigis demokratian reformon. En 1960, ni efektivigis agrikulturan kooperativigon kaj suriris la larĝan ŝoseon de socialismo.

Por la servutuloj liberigitaj el la maro de mizero, Prezidanto Maŭ estas la plej kara. Post la agrikultura kooperativigo, ni firme efektivigis la ĝeneralan linion “**streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide,**

bone kaj ekonomie”, persistis en “**sinapogo sur propraj fortoj**” kaj “**penema lukto en malfaciloj**” kaj starigis por ni la celon konstrui socialisman novan kampanon per batalo kontraŭ la naturo en la valo neĝmonta. En la lastaj dek jaroj, precipe post la komenco de la Granda Proletara Kultura Revolucio, ni fosis 30 kanalojn grandajn kaj malgrandajn kun la totala longo de pli ol 90 kilometroj sur la neĝmonto kaj efektivigis irigaciadon de la kampoj; ni uzis pli ol 50,000 kubmetrojn da ŝtonoj por masoni kampegojn kaj konstruis pli ol 1,500 ŝtuparkampojn kun totala areo de 721 muoj. Per tio ni ŝanĝis la postiĝintan staton de terkulturado per primitiva metodo kaj altigis la totalan produktkvanton de greno de 145,000 kilogramoj en 1960 ĝis 510,000 kilogramoj en 1969; la nombro de dombestoj grandaj kaj malgrandaj kreskis de 846 en 1960 ĝis 1726 en 1969. Kun disvolviĝo de la produkto, la komuna fonduso kaj la kvanto de rezervita greno kreskas ĉiujare. Ni konstruis elektran stacion de 80 kilovatoj, starigis disaŭdigan reton kaj ĉiuj vilaĝoj povas aŭdi la voĉon de Prezidanto Maŭ. En la pasinteco, ne troviĝis ĉe ni lernejo, sed nun la brigado jam fondis 9 elementajn lernejojn funkciigatajn de la popolo. Nia brigado havas kuracejon kaj ĉiu produkta grupo sian “nudpiedan kuraciston”.

La procezo de nia konstruado de socialisma nova kampano en la neĝmonta valo en la lastaj dek jaroj plenis de akraj kaj komplikaj bataloj inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj.

En 1960, mi laboris kiel sekretario de la partia filio de Hinlian-brigado. Tiutempe ĵus stariĝis la agrikultura produkta kooperativo, kaj pro la malalteco de grenprodukto nemalmultaj familioj de la brigado ne havis sufiĉe da greno por sia konsumo kaj devis esti helpataj de la ŝtato. Ĉu oni dependu de la ŝtato aŭ venku la malriĉajn montojn kaj plagajn torentojn kaj disvolu agrikulturan produktadon sin apogante sur la propraj fortoj kaj penante en malfaciloj? Tio estas problemo koncernanta la firmigon de la agrikultura kooperativo kaj ankaŭ estas problemo de batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj en konstruado de kampano.

La partia filio de la brigado gvidis la vastajn amasojn de liberigitaj servutuloj foj-refoje studi la grandajn instruojn de Prezidanto Maŭ “**sinapogi sur propraj fortoj**”, “**peneme lukti en malfaciloj**” kaj “**malriĉeco igas aspiri al ŝanĝo, entreprenado kaj revolucio**”, kaj alvokis la popolanojn ŝanĝi la fizionomion de malriĉeco kaj blankeco per la montranslokiga spirito de la Malsaĝa Avo. Kun senlime profunda proletara amo al Prezidanto Maŭ, la vastaj amasoj de liberigitaj servutuloj transformis la naturon kaj konstruis novan kamparon, sekvante instruojn de Prezidanto Maŭ. Ili diris: “Prezidanto Maŭ liberigis nin kaj la Liberiga Armeo ruĝigis tiun ĉi areon per siaj sango kaj vivo. Nun la montoj kaj akvoj fariĝis niaj kaj nia devo estas defendi kaj konstrui la lokon.”

“Akvoutiligo estas la aorto de agrikulturo.”

Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, ni zorgis antaŭ ĉio pri la akvoutiliga konstruado kaj decidis fosi Hinlian-kanalon 12 kilometrojn longan ĉe la talio de la neĝmonto. Kiam la plano estis proponita, iu enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon diris: “Havante nek monrimedon nek teknikon, ĉu oni povas konstrui kanalon?” Kaj kalumniante, ke tio “lacigos la popolon kaj perdigos la monon”, li malpermesis fari la konstruadon. Ankaŭ iuj aliaj kun konservativa penso diris: “Ŝtonoj ja ne estas ŝlimo. Se vi sukcesos konstrui la kanalon, tiam vi povos tiri min kiel bovon je la nazo.” Tiam, ni kaj la amasoj foj-refoje studis la “tri popularajn artikolojn”, armis nin kaj la amasojn per Maŭzedongpenso. La vastaj amasoj diris: “La familio de la Malsaĝa Avo povis translokigi du montojn, kaj ni liberigitaj servutuloj armitaj per Maŭzedongpenso certe povos igi la miljaran neĝmonton klini sian kapon kaj igi la dekmiljaran glaci-riveron cedi al ni vojon.” En decembro, kiam regis frostoj, ni marŝis kontraŭ neĝblovo sur la neĝmonton alte tenante ruĝan standardon kaj ekkampis tie. Kun ruĝa koro, ni ŝvingadis pioĉojn per niaj manoj kaj fosadis senĉese en ĉiu tago. Post luktado en du vintroj kaj du printempoj, fine ni konstruis Hinlian-kanalon 12 kilometrojn longan, kiu alkondukis akvon de sur la neĝmonto. La fakto frakasis la kalumnion de la enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj edukis la vastajn amasojn. Disvolviĝis alta tajdo de akvoutiliga konstruado. En kelkaj jaroj ni jam efektivigis irigaciadon de la kampoj kaj ŝanĝis la antaŭan staton de senrikolteco en naŭ el dek jaroj pro trosekeco. Rigardante la kanaletojn ĉe la talio de la neĝmonto, la liberigitaj servutuloj ĝoje diris:



*La verkinto kamarado Kilinvangdan**

“Ili ne estas klaraj fontoj, sed pure blankaj hadaĵoj**”, kiujn ni prezentas al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.”

En 1964, oni alportis la brilan instrukcion de Prezidanto Maŭ “**lerni de Daĝaj en agrikulturo**”. Kiel leviĝanta ruĝa suno super la neĝmonto, ĝi tute heligis la koron de la liberigitaj servutuloj. Sub la gvido de la partia filio la popolanoj foj-refoje studis la grandan instrukcion de Prezidanto Maŭ kaj profunde komprenis, ke en lernado de la Daĝaj-anoj unue oni devas lerni de ili la senliman fidelecon al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, vivan studon kaj vivan aplikon de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj disvolvon de la revolucia spirito de sinapogo sur propraj fortoj kaj penado en malfaciloj. Samtempe, ili resumis sian sperton kaj decidis vaste konstrui ŝtuparkampojn sur la neĝmonto. Enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon malestime diris al ni: “Eĉ montdeklivajn kampojn vi ne scipovas kulturi, kaj tamen vi deziras konstrui kampojn!” Klasaj malamikoj mallice disemis superstiĉajn onidirojn: “Se oni tuŝos monton de dio dum fosado en konstruo de ŝtuparkampoj, li punos nin kaj tiam mortos homoj kaj dombestoj.” Ni batalis kontraŭ la klasaj malamikoj, ignoris la enpartiajn potenctenantojn irantajn la kapitalisman vojon, suriris kun la milicanoj kiel la spino, la “dian monton”, kiun oni ne kuraĝis tuŝi dum jarcentoj, kaj konstruis 30 muojn da

Verkoj de Maŭ Zedong

(en Esperanto)

(Parto de la Broŝure Eldonitaj Verkoj en la Periodo 1941-1945)

Antaŭparolo kaj Postskribo al la <i>Kamparaj Enketoj</i>	16 pĝ
Reformu Nian Studon	20
Parolado ĉe la Asembleo de Rerezentantoj de la Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a Limregiono	12
Ĝustigo de la Partia Laborstilo	36
Kontraŭ Partia Stereotipajo	36
Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an	60
Kelkaj Problemoj pri Metodoj de Gvidado	16
Organiziĝu!	20
Nia Studo kaj la Aktuala Situacio	32
Servu al la Popolo	16
Ni Devas Ellerni Ekonomian Laboron	20
Pri Koalicia Registaro	136

Eldonitaj de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio

Distribuas la Libro servo de la Ĉina Esperanto-Ligo

P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

ŝtuparkampoj. Poste, oni okazigis ĉelokan kunvenon kaj disvastigis la sperton en la tuta brigado kaj levis altan tajdon de lernado kaj kuratingado de Daĝaj.

En pasintaj miloj da jaroj, pro la ekspluatado kaj subpremado fare de la servutulaj mastroj kaj postiginteco de la kultura tekniko, ni scipovis kulturis nur sekalon kun malalta produktkvanto. Nun, dank' al akvoutiliga konstruado kaj konstruo de ŝtuparkampoj, ni kulturis tritikon kaj maizon kaj ricevis riĉajn rikoltojn en sinsekvaj jaroj. La liberigitaj servutuloj ĝuas feliĉon kun rido en la okuloj, ĝojo en la koro kaj dankemo al nia savanto Prezidanto Maŭ.

La Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ levis la vastajn amasojn de liberigitaj servutuloj al nova alteco en ideologio, kaj ilia revolucia entuziasmo por venki la naturon plene disvolviĝis. Por ke la plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ

estu ĝustatempe komunikitaj kaj efektivigitaj, ni tuj organizis grupon de 60 milicanoj, kiu pene luktis 5 monatojn, konstruis ferkablan ponton 60 metrojn longan, malfermis 16 danĝerajn pasejojn per dinamito sur la rokmuro de la neĝmonto kaj elfaris 32 kilometrojn longan vojon tie, kiu rekte kondukas al vilaĝo post la neĝmonto. La liberigitaj servutuloj ĝoje nomas ĝin Vojo al la Suno. La popolanoj kantas:

Vojo al la Suno, Vojo al la Suno,

En la valon vi matenan sunon gvidas,

Kaj la bril' de Prezidanto Maŭ lumigos ĉiam la neĝmonton;

La liberigitaj servutuloj ĉiam iros vojon tiun ĉi de li montritan.

*La aŭtoro estas sekretario de la kompartia filio de Hinlian-brigado de Ĝongdian-gubernio, Junnan-provinco.

**Hada-o: peco da blanka silkaĵo uzata de tibetanoj kiel donaco por montri sian respekton kaj benon.

Vasta Sablejo

Fariĝis Verdejo

ALVENINTE Dianbaj-gubernion de Guangdong-provinco, oni sin trovas en verda mondo. Laŭ la marbordo aperis verda longa muro kun la longeco de 81 kilometroj. En tiu loko, ĉu en urbetoj aŭ vilaĝoj, ĉu en kamparo aŭ montaro ĉie estas densaj arbaroj en prospero. La grandskala forstigado de la tuta gubernio forte antaŭenpuŝis la disvolviĝon de agrikultura produkto.

Sed kiu kredas, ke antaŭ dekkelkaj jaroj Dianbaj estis mizera loko, kie "sablo kovras la ĉielon kiam blovas vento". Komence de 1954, por firmigi kaj disvolvi la socialisman kolektivan ekonomion, kuraĝigate de la granda alvoko de Prezidanto Maŭ "verdigi la patrolandon", la popolo de Dianbaj persiste forstigadis senĉese en 16 jaroj per siaj laboremaj manoj por transformi la naturon kaj turnis la dezertejon estintan en verdejon hodiaŭan.

KONTRIBUO DE VIRINOJ

Dianbaj-gubernio situas sur la bordo de la Suda Maro. Antaŭ la Liberiĝo, malpli ol centono de la 3,180,000 muoj da tero de la tuta gubernio estis kovrita de arbaroj, kaj tre malbonaj estis la naturaj kondiĉoj. Tiam en la montregiono en la norda parto de tiu gubernio sin trovis malmultaj arbaroj, sed rezulte de la ekspluatado de la kuomintangana reakciularo ankaŭ tie la montoj fariĝis

malabundaj je arboj. En la montetoza meza parto de ĝi, la tero krevis pro sekeco kaj serioze perdiĝis akvo kaj grundo. Laŭ la marbordo estis vasta strando, kie sablo ruliĝis kaj vualis la sunon, kiam blovis ventego. Tieaj maljunaj fiŝistoj ofte rakontis al junuloj pri tragikaj okazintaĵoj en la malnova socio. En iu jaro, kiam fiŝisto Vang Jadong estis trapasanta la strandon revenante de fiŝado sur la maro, subite uragano ekmuĝis kaj plenigis la aeron per sablo. Vidante la minacantan danĝeron, li kuris tutforte por eskapi de ĝi. Sed la ruliĝanta sabla torento baldaŭ jam dronigis lin. . . .

Dum la longa mizera vivado, la popolo de Dianbaj tage kaj nokte sopiris, ke frue venu al ili feliĉaj tagoj.

Sub la gvido de Prezidanto Maŭ la nova socialisma Ĉinio ĉiam pli prosperiĝas kaj potenciĝas. En 1954, la vastaj amasoj de malriĉaj fiŝistoj kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Bohe-urbeto la unuaj klarionis la komencon de la batalo de forstigado.

Bohe-urbeto estis duoninsulo kun 23,270 muoj da sablejo, i.a. estis pli ol 16,000 muoj da preskaŭ nefruktodonaj sablozaj kampoj. En tiu tempo, la viroj forveturis por fiŝkaptado sur la maro, tial la peza tasko de forstigado falis sur la ŝultrojn de la virinoj, kiuj ne kutimiĝis al agrikultura laboro kaj ne havis sperton en forstigo.



Virinoj de la forstiga brigado "Oka-marto"

Multajn malfacilojn alfrontis ili. En la unua fojo ili plantis tri mil junajn kasuarinojn (*casuarina eguissetifolia*), sed ĉi tiuj mortis de blovado de uragano post kelkaj tagoj. Iuj konservativuloj diris: "Vi virinoj povos sukcese kreskigi arbojn sur la strando, escepte se naĝos ŝtonoj kaj floros cikaso." La malsukceso de la unuafoja provo ne ŝancelis la decidemon de la virinoj por transformi la naturon. Ili diris memfidplene: "Sub la gvido de Prezidanto Maŭ, ni nepre kreos arbarojn sur la strando!" En la sekvinta printempo, ili faris pluan provon. Ĉifoje, ili serioze resumis la kaŭzojn de la lasta malsukceso kaj trovis, ke pro troa malkompakto de la sabla grundo kaj troa furiozo de la vento oni ne povas rekte planti arbidojn en la strandon. Ili do fosis kavojn en la sablejo, alportis ŝlimon kaj ĝin metis en ilin. Tiam estis sezono, kiam blovis ĝisoste frosta vento en la sudo. Kompartiano Ĉen Giaŭ la unua saltis en malvarmegan lageton por elfosi ŝlimon. Per sia modela ago ŝi stimulis la aliajn virinojn, kiuj ankaŭ ensaltis unuj post aliaj. Ili pene batalis

en kvar sinsekvaj tagoj kaj kolektis pli ol okdek mil korbojn da fekunda ŝlimo.

Post planto de la arbidoj, ili zorge flegis ilin kiel bebojn kaj persiste ilin akvumis ĉiutage. Kaj fine kreskis 80-90 procentoj de la 6,000 plantitaj kasuarinoj. Tiuj estis la unua generacio de arboj sur la sablejo.

Popolo diras: "Arbo plenkreskiĝas en dek jaroj." Kreskante generacion post generacio kaj jaron post jaro, nun la arbidoj plantitaj de la virinoj jam fariĝis arba maro post 16 jaroj!

ĈIO ESTAS ATINGEBLA PER MOBILIZO DE LA AMASOJ

La venko de la popolo de Bohe en forstigado multe firmigis la memfidon de la popolo de Dianbaj-gubernio por konkeri la dezertajn sablejojn kaj kalvajn montojn. Kaj ili agis laŭ la instruo de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ: "En socia-

lisma revolucio kaj socialisma konstruado, oni nepre devas persisti en amasa linio, senrezerve mobilizi la amasojn kaj energie konduki amasan movadon.” Sekve arde disvolviĝis amasa movado por forstigado tra la tuta gubernio.

Kun disvolviĝo de la amasa forstiga movado, ĉiam pli grandiĝis ankaŭ la bezonoj de monrimedoj kaj arbitoj. Sed de kie oni akiru dekmilojn da arbitoj? Por solvi la problemon de arbitoj, disvolvante la spiriton “sinapogi sur propraj fortoj”, la popolo de Dianbaj disvolvis en la tuta gubernio amasan movadon “ĉiu kolektu arbosemojn kaj ĉiu produkta grupo starigu arbitan kulturejon”, kaj tiamaniere surmetis bazon por forstigado en vastaj areoj.

Per sia penado en la pasintaj 16 jaroj, la popolo de Dianbaj jam konstruis 1,590,000 muojn da forstoj en la 1,600,000 muoj da montaj, dezertaj kaj strandaj areoj. Sur la montoj, antaŭe kalvaj, aperis livistonaj (*livistona chinensis*) arbaroj, fruktaj ĝardenoj kaj forstoj por konservo de akvo kaj grundo en la meza montetoza regiono; la norda montregiono fariĝis bazloko de pinoj, abioj, kamforarboj, bambuoj, aleŭritoj kaj aliaj arboj por liveri lignon aŭ aliajn ekonomiajn valoraĵojn; ambaŭflanke de la ŝoseoj kun longo de ĉ. 700 kilometroj en la gubernio oni plantis po du aŭ plurajn vicojn da arboj; kaj tre bele aspektas tiuj avenuoj.

La forstigo de la tereno riĉigas akvofontojn, konservas akvon kaj grundon, katenas sabloventon, bonigas la grundon, plibonigas la kondiĉojn de la klimato kaj multe akcelas disvolviĝon de la agrikultura produkto. La ducent mil muoj da kampoj, kiuj estis ofte atakataj de sablovento, fariĝis kampoj de stabila altkvanta produkto, tricent dek mil muoj da neirigaciataj kampoj fariĝis rizkampoj kaj okdek mil muoj da kampoj, kiuj antaŭe donis nur unu rikolton en jaro, fariĝis kampoj de du rikoltoj. Dum la pasintaj pli ol 20 jaroj antaŭ la Liberiĝo, pro serioza damaĝo de sablovento, naŭ el la vilaĝoj kun pli ol 2,000 muoj da tero de Hajnan-komunumo estis glutitaj de sablovento. Post konstruo de la ventopreventa forstozono, la tuta areo da ensablita tero estas denove kulturata kaj la pomua produktkvanto de rizo de tiuj kampoj atingis meznombro 375 kilogramojn. En 1963, katastrofo de malofta trosekeco trafis tiun lokon, tamen la produktkvanto de rizo en la tuta gubernio grandskale plialtiĝis; en la jaro 1965, 11-grada tajfuno kaj potencega tajdo malofta en la historio atakis tiun gubernion,

sed la produktkvanto de rizo de la tuta gubernio estis je dek procentoj pli granda ol tiu de la antaŭa jaro. La forstigado ankaŭ solvis la problemon de ligno bezonata de la popolo de la tuta gubernio por hejtado, konstruado de domoj, akvokonservejoj, pontoj, ŝipoj kaj farado de agrikulturaj instrumentoj kaj liveris al la ŝtato ĉirkaŭ milionon da kubmetroj da ligno por uzo de konstruado. La amasoj ĝoje diris: “En la pasinteco, mankis al ni akvo, brulligno kaj greno; sed nun ni havas kaj akvon kaj brullignon kaj grenon.”

IRI LA SOCIALISMAN ŜOSEON STRIKTE SEKVANTE PREZIDANTON MAŬ

La forstiga historio de la popolo de Dianbaj estas historio de klasbatalo kaj batalo inter la du linioj. La venko de Dianbaj en konstruado de forstoj estas venko de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

En 1954, varme respondante al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ “**verdigi la patrolandon**”, kun ĝisĉiela entuziasmo la popolo de Dianbaj lanĉis grandskalan operacion kontraŭ la strandoj, sed tiam plenmano da klasaj malamikoj disemis superstiĉaĵon, dirante ke “sur la strandoj sin trovas tomboj de praavoj kaj planti arbojn tie certe alportos plagon al ĉiuj”, kun la vana espero subfosi la forstigan movadon. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris decideme: “Ni ne timas fantomojn, nek kredas je dio, sed decideme iros la ŝoseon montritan de Prezidanto Maŭ, kaj ni nepre plantos arbojn!” Ili senŝanceliĝe kondukis batalon kontraŭ la strandoj.

Kiam la nacia ekonomio de nia lando renkontis portempan malfacilon en la jaro 1962, la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en Dianbaj-gubernio, kiuj ĉiam revadis restaŭri kapitalismon en Ĉinio, energie disvastigis la nigran varon de “plivastigo de parceloj por privata uzo kaj de liberaj merkatoj, pliigo de etaj entreprenoj mem respondecaj pri la propraj profitoj aŭ perdoj kaj fikso de produkta kvoto bazita sur familia mastrumado” ankaŭ en la konstruado de forstoj kaj ordonis, ke oni disdonu la montajn arbarojn de la kolektivoj al la familioj kaj transdonu la ŝtatajn arbarajn entreprenojn al produktaj brigadoj. Ĉar la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj firme rezistis kontraŭ tio, ilia intrigo ne efektiviĝis.

En la jaro 1965, kiam la popolo de la tuta gubernio estis energie plantanta arbarojn de ligno kaj aliaj ekonomiaj valorajoj kun firma decido por antaŭenpuŝi la forstigadon al nova stadio, plenmano da potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon de la malnova gubernia partia komitato tamen diris absurde, kun la vana espero konduki la forstigadon sur eraran vojon: "Dianbaj jam famiĝis pro forstigado kaj multaj homoj ĝin vizitas por lerni sperton. Sole tiaj arbaroj ne plaĉas al la okuloj, de nun ni devas energie fari beligon kaj aromigon." Ili krome instrukciis al Nanhajkomunumo: "Forhaku la forstan zonon por planti kokosarbojn, kreskigu akvomelonojn sube de ili kaj kulturu aromajn florojn ĉirkaŭ la akvomelonaĵoj." Ju pli multe la vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkam-

paranoj pensis pri tiu opinio, ili trovis ĝin des pli absurda kaj diris indigne: "Tiu propono via servas al la interesoj de malmultaj burĝaraj sinjoroj, sed ni forstigas por preventi damaĝojn de vento kaj sablo kaj protekti kampojn, nome por akceli la agrikulturan produkton, por la socialisma konstruado. Ni ne bezonas vian absurdaĵon!"

Depost la komenco de la Granda Proletara Kultura Revolucio, laŭ la granda instruo de Prezidanto Maŭ "**marŝi al la profundeco kaj vasteco de la produktado**", la popolo de Dianbaj energie disvolvas bambuarbojn kaj arbarojn de kamforarboj, livistonoj kaj fruktarboj kaj aliajn arbarojn de ekonomiaj valorajoj surbaze de la vasta plantado de arbaroj por ligno, prevento de vento kaj konservado de akvo kaj grundo. Nun ĝi estas brave antaŭenmarŝanta laŭ la socialisma ŝoseo.

Ĉen Giaŭ (maldekstre la dua), modelo en gvido de la unuageneraciaj virinoj en forstigado, rakontas historion pri la forstigado al membrinoj de la forstiga brigado "Oka-marto".



FANG LIANG:

Socialisma Vojo Fariĝas Ĉiam Pli Larĝa



Kamarado Vang Ginjoŭ (dekstre), la sekretario de la partia filio de Ŝangvang-brigado

LA areo, kie troviĝas nun Ŝangvang-brigado de Hongŝan-komunumo de Ŝaŭhing-gubernio, Ĝegiang-provinco, estis malriĉa montvalo antaŭ la Liberigo. El la 85 familioj de la tuta vilaĝo, pli ol 70 vivtenis sin per transportado, palankena portado, kolektado de brulligno, dungigo ĉe bienuloj kaj almozpetado. Post la Liberigo, sub la saĝa gvidado de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj firme sekvas la socialisman vojon de kolektivigo, tiel ke al ili ĉiam pli prosperas la produktado kaj pli boniĝas la vivo. Precipe dank' al la Granda Proletara Kultura Revolucio, Maŭzedongpenso profunde eniĝis en la koron de homoj, la vasta amaso de komunumanoj starigis en si la penson agrikulturi por la revolucio. Sekvante la grandan orientilon de Prezidanto Maŭ **“sinapogo sur propraj fortoj, penema lukto en malfaciloj”**, ili konstruis 11 akvo-konservejojn kaj pli ol 70 muojn da kampoj laŭ la tipo de Daĝaj. La pomua produkto de greno atingis pli ol 700 kilogramojn. Estas nove starigita teplantejo kun amplekso de 560 muoj kaj produkto de 52,550 kilogramoj. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris ĝojplene: “Maŭzedongpenso brile lumigas nian koron kaj la socialisma vojo fariĝas ĉiam pli larĝa.”

En 1958, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ elmetis la ĝeneralan linion **“streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie”**. Sub la brilado de la ĝenerala linio, Ŝangvang-brigado

mobilizis la amason por fari militiron al la kalvaj montoj kaj transformi ilin unu post alia en teplantejojn.

Por fari tiun entreprenon mankis unue semoj kaj due monrimedoj. Sur la montoj estas ŝtonamasoj kaj sovaĝaj herboj. Alfronte al sennombraj malfaciloj, la partia filio de la brigado tuj organizis la komunumanojn lerni la verkon de Prezidanto Maŭ *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo* kaj kuraĝigis la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn per la brila figuro de la Malsaĝa Avo. Ĉiuj diris: “La Malsaĝa Avo povis formovi siatempe du grandajn montojn kun sia familio. Ni nepre transformos la kalvajn montojn en plantejojn.” Post la lernado la komunumanoj fariĝis akrapidaj kaj klarmensaj kaj alte levis sian batalvolon. Komenciĝis la batalo por kultur-ebligi la montojn en la frosta vintro de tiu jaro. La sekretario de la partia filio kamarado Vang Ginjoŭ aranĝis ke la maljunaj kaj malfortaj komunumanoj laboru sur la sudaj deklivoj kaj li mem iris labori kun kompartianoj, komunismaj junulaj ligoj kaj fortaj junuloj al la malvarmaj, nordaj deklivoj. Por gajni tempon por teplanti jam en la sama jaro, ili suriris la montojn jam antaŭ mateniĝo kaj nokte ili daŭre laboris sub torĉoj. La semoj venis de la kontribuoj de komunumanoj mem kaj por solvi la problemon de monrimedoj ili kolektis brullignojn por vendi al la vendkoopertivo. Tiel ili akumulis pli ol 6,000 *yuan* post laborego en unu vintro. Post daŭra luktado de la komunumanoj, estis plugitaj 11

montoj sur kiuj tearbidoj estis plantitaj pli ol 300 muojn. La spirito de Daĝaj sinapogi sur propraj fortoj kaj penadi en malfacilaj kondiĉoj por entreprenado floris kaj fruktis en Ŝangvang-brigado.

La vasta amaso de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Ŝangvang-brigado estas sentima, heroa kolektivo ankaŭ antaŭ seriozaj naturaj katastrofoj. Ili renkontis plurajn gravajn naturajn katastrofojn kaj venkis ilin unun post alia.

En la unua tagdeko de septembro 1962, daŭre falis pluvego dum sinsekvaj tagoj. La atmosfera precipitado atingis pli ol 350 milimetrojn. Estis detruitaj 32 muoj da riz- kaj sek-kampoj kaj pli ol 40 ŝtonaj bordteĝaĵoj, 40-50 akvokonservejetoj sur montoj estis plenigitaj per sabloŝlimo, multaj plantaĵoj estis forportitaj de torento kaj damaĝita estis la kolektiva ekonomio. Sed la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la brigado tute ne estis deprimitaj, kaj aktive sin ĵetis en la batalon kontraŭ la akvego laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **“Fari firman decidon, timi neniam oferon kaj superi ĉiujn malfacilojn por akiri venkon.”** Ili forportis el la rizkampoj kaj batatplantejoj la sedimenton el sablaĵo alportitan de torento kaj plenigis ilin per grasa grundo. La difektitaj digoj, montaj akvokonservejetoj, ŝtonaj bordteĝaĵoj ĉiuj estis riparitaj; damaĝitaj plantaĵoj estis anstataŭitaj senprokraste per novaj kaj estis pli intensigita la surkampa flegado pri la malfrue maturiĝantaj plantaĵoj. Tiun jaron riĉa rikolto ankoraŭ estis akirita. La komunumanoj diris el la propra sperto: **“Ja bona estas socialismo kaj neelĉerpebla la forto de kolektivo!”**

En aŭtuno de 1967, sekeco atakis la brigadon. Dum pli ol 100 tagoj ne falis eĉ unu guto da pluvo, tiel ke riveretoj, fosajoj, akvokonservejoj elmon-

tris sian fundon kaj krevis la rizkampoj kaj aliaj plantejoj. Estis videble ke batatoj kaj rizoj velkos de soifo. Kun alta batalvolo, ili aktive luktis kontraŭ la natura katastrofo, alkondukante akvon per forhako de roko por akiri grenon kontraŭ la katastrofo. Unuanime luktante en sinsekvaj 8 tagoj kaj noktoj, ili fosis kanalon longan je pli ol 60 metroj, larĝan je 1 metro kaj profundan je 4 metroj. Dank’ al tio akvo estis kondukita al ŝtuparkampoj kaj bona rikolto de malfrua rizo estis akirita.

Kiel oni traktis la rilatojn inter la interesoj nunaj kaj estontaj kaj inter tiuj de ŝtato, kolektivo kaj individuoj en Ŝangvang-brigado, post kiam ili akiris riĉajn rikoltojn de grenoj kaj teo en sinsekvaj jaroj sur la larĝa vojo de socialismo? La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la brigado pensis antaŭ ĉio pri la ŝtato kaj kolektivo. Ili diris: **“Ke nia brigado nun havas feliĉajn tagojn, tion ni dankas tute al la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ. Post riĉa rikolto, ni devas pensi pri la socialismaj, longperiodaj interesoj kaj neniam devas forgesi plifortigi la kolektivajn ekonomion kaj subteni la konstruadon de la lando.”**

En aprilo de 1969, kamarado Vang Ginjoŭ glore ĉeestis la Naŭan Tutlandan Kongreson de KPĈ kaj feliĉe vidis la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ. De tio la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj kadroj de la brigado estis multe kuraĝigitaj. Ili decidis strikte sekvi la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ, plie disvolvi la amasan movadon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso kaj fari kontribuojn por solidigi la diktaturon de la proletaro kaj konstrui novan, socialisman kamparon.



Komunumanoj ŝprucigas insektomortigilon al tearboj por preventi insektan malutilon.

Lukto kontraŭ la Sovaĝaj kaj Kalvaj Montoj por Konstrui Novan Ŝangvang

Kamarado Vang Ginjoŭ (*centre*), sekretario de la partia filio de Ŝangvang-brigado de Hongŝan-komunumo de Ŝaŭhing-gubernio de Ĝegiang-provinco, diskutas kaj planas kune kun malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj pri konstruado de nova socialisma vilaĝo.







Ŝangvang-brigado ŝanĝas sian malriĉan fizionomion. Jen komunumanoj konstruas siajn novajn domojn.

Persistante pri la principo “sinapogi sur propraj fortoj” kaj “peneme lukti”, la vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj de Ŝangvang-brigado turnis la pasintajn sovaĝajn kaj kalvajn montojn en teoplantejojn.

Jen tritikaj kampoj estis transformitaj el ŝtonsa-blejo fare de la komunumanoj de Sangvang per la diligenta laboro.



Venkinte diversajn natu-rajn katastrofojn, Sang-
vang-brigado akiris en
sinsekvaj jaroj grandajn
riĉrikoltojn de grenoj.



Rakontoj pri Sciencaj Laborantoj en Servo al Agrokulturo

KURACI ĈINAN BRASIKON

Posttagmeze de iu sabato en aŭtuno de 1969, du komunumanoj de antaŭurbo de Pekino venis en la Botanikan Instituton de Ĉina Akademio de Sciencoj kunportante du ĉinajn brasikojn kaj petis, ke oni ilin kuracu. Se tio okazus antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, iuj kamaradoj de la instituto rifuzus ilian peton kun pretekstoj, kiaj “kuraci brasikojn ne estas nia propra okupo” k. a.

Sed nun dank’ al la Granda Proletara Kultura Revolucio, tute aliigis la spirita fizionomio de la botanika instituto. Kamaradoj akceptantaj la du komunumanojn firme esprimis: “La bezonoj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, la bezonoj en agrokulturo ja estas nia propra okupo! Ni nepre klopodos por resanigi la brasikojn!”

Sub la gvido de la PLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso laboranta en la instituto kaj la revolucia komitato de la instituto, sciencaj esploristoj sin organizis en grupo kaj venis al produkta brigado Huajŝuguj de Hajdiankomunumo. Vidante ke la folioj de la brasikoj velkiĝas, iliaj radikoj nigriĝas kaj iuj el ili jam komencis putri, la sciencaj laborantoj tre maltrankviliĝis. Sed netrovebla estas kuraca rimedo en literaturo en- kaj ekster-landa. Montrante la brasikan kampon, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris fervore: “Malsanojn nekuraceblajn por burĝaraj sinjoroj ni tamen kuracos. Ni havas Maŭzedongpenson, do neniu malfacilo estas nevenkebla por ni! La brasikojn en tiu ĉi kampo ni konfidis al vi, do provu kurage!” Kuraĝigite, la revoluciaj sciencaj esploristoj studis la grandan instruon de Prezidanto Maŭ “**rompi superstiĉon kaj liberigi penson**”, kaj ankoraŭ pli firmiĝis ilia decidemo. Ili iris al la kampo kaj

tie laboris kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por enketi pri la procezo de malsaniĝo de la brasikoj ĉe malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj lerni de ili sperton pri prevento kaj kuraco de brasikaj malsanoj. Post foj-refoja studo, ili trovis ekonomian kaj efikan kuracrimedon taŭgan por disvastigo en la kamparo de nia lando. Fine oni sukcesis kuraci la brasikojn per ĝi kaj ricevis riĉan rikolton.

KONSERVADO KAJ FREŜEC-TENADO DE TOMATO

Ĉiuj scias, ke tomatoj estas putriĝemaj kaj malfacile konserveblaj. Sed nun oni jam povas konservi tomatojn por pli ol cent tagoj.

Antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, kamaradoj de la Botanika Instituto jam studis la problemon de konservado kaj freŝec-tenado de tomatoj kaj aliaj legomoj kune kun frataj unuoj. Sed plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon diris, ke tiu esploro “ne povas produkti teorion kaj ne estas en la ĝenerala direkto de scienca esplorado”, kaj sekve sufokis tiun esploradon.

En la granda kultura revolucio, la problemo de konservado de tomatoj altiris la atenton de la laborista kaj PLA-a propagandaj taĉmentoj de Maŭzedongpenso. Laŭ la granda instruo de Prezidanto Maŭ “**sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo**”, la membroj de la taĉmentoj, kune kun la membroj de la revolucia komitato de la instituto, venis al la legomstacio de Ĉongven-kvartalo de Pekino gvidante revoluciajn sciencajn laborantojn por studi kaj solvi la problemon de konservado kaj freŝec-tenado de tomatoj kune kun revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la stacio. Post foj-refoja kuna studado ili trovis novan rimedon por konservi

tomatojn por ĉirkaŭ unu monato. Vizaĝe al la sukceso, iuj el sciencaj laborantoj ekmemkontentiĝis. Foliumante eksterlandan materialon, ili diris kun ĝojo: "Laŭ koncernaj registroj eksterlandaj, oni neniam sukcesis konservi tomaton por tiel longa tempo, sed ni....."

La kamaradoj de la propagandaj taĉmentoj konsciis, ke tio ĉi estas manifestiĝo de la neĝisfundo de revoluciado de intelektuloj. Por helpi la sciencajn esplorantojn venki la fieriĝon kaj memkontentiĝon, membroj de la propagandaj taĉmentoj organizis revoluciajn sciencajn laborantojn studi koncernajn instruojn de Prezidanto Maŭ kaj diris kun sincera zorgo: "Por ĉerpi nutraĵon, arboj devas etendi siajn radikojn profunde en grundon, kaj por ĝisfunde remuldi sian mondkoncepton, intelektuloj devas kombiniĝi kun laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj dum la tuta vivo. Apenaŭ akirinte ian sukceson sub la helpo de la oficistoj kaj laboristoj de la legomstacio vi jam memkontentiĝis. Estu singardemaj kontraŭ retroiro!"

Tiuj vortoj profunde tuŝis la revoluciajn sciencajn esplorantojn. En iliaj cerboj aperis la scenoj de iliaj klopodoj por konservo kaj freŝec-tenado de tomatoj kune kun la laboristoj: dum la esploro,

iuj kamaradoj ne havis sufiĉe da memfido antaŭ malfaciloj. Sed laboristo diris tre memfide al la revoluciaj esplorantoj: "Ne deprimiĝu. Kiel oni povas sukcesi sen malsukcesoj? Se ni ne sukcesos per unufoja provo, ni provos centfoje; se ni malsukcesos centfoje, ni provos milfoje. Posedante la ĉiamvenkan Maŭzedongpenson, ĉu ni tamen ne sukcesos?" Kaj tuj sekve la laboristo eltrovis bonan tomaton el amaso da putraj kaj diris al la revoluciaj sciencaj laborantoj: "Prezidanto Maŭ instruis al ni, ke **'la universaleco ekzistas ĝuste en la partikulareco'**. La aliaj tomatoj ĉiuj putriĝis, sed kial tiu ĉi ne? Ni devas bone esplori tiun ĉi tomaton kaj certe povos trovi leĝon el ĝi!" Dank' al la kuraĝigo de la laboristoj kaj la helpado kaj kunlaboro de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj komercaj entreprenoj, finfine ili akiris la sukceson konservi tomaton por pli ol unu monato, prenante tiun tomaton kiel atakan punkton.

Post konstanta resumo de spertoj kaj plibonigo de la metodo, ili fine atingis la novan sukceson de konservado de tomato por pli ol cent tagoj kaj krome ankaŭ la kvalito de freŝec-tenado estas multe altigita.



GRANDTIPA TURO POR SINTEZI UREON

La plej granda turo por sintezi ureon jam estas sukcese provproduktita de la Langou-a Fabriko de Petrolkemijaj Maŝinoj kaj jam komenciĝis pogranda produkto de ĝi.

Tia turo por sintezo de ureo estas farita tute el altfortikeca malaltaĵa ŝtalo produktita de nia lando. De ĝia projektado ĝis sukcesa fabrikado la laboristoj kaj revoluciaj kadroj kaj teknikistoj de tiu fabriko uzis nur 5 monatojn. Post teknika ekspertizo oni konstatis, ke la kvalito atingis avangardan

nivelon. La sukcesa fabrikado kaj pogranda produkto de ĝi forte akcelos la disvolviĝon de nia kemisterka industrio.

LUBRIKA OLEO POR CILINDRO DE OCEANA ŜIPO

Altklasa lubrika oleo por ocean-ŝipa cilindro estas sukcese fabrikita en nia lando. Prova uzado en niaj oceanaj ŝipoj pruvis, ke tiu oleo jam atingis la progresintan nivelon de la mondo en la ĉefaj kvalitaj postuloj.

Dank' al viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso la laborantoj partoprenantaj la provfaradon de tiu lubrika oleo por ocean-ŝipa cilindro plenumis la taskon en la tempo de nur dek monatoj. La sukcesa elfaro de tia lubrika oleo rompis la monopolon de imperiismo kaj moderna reviziismo super ĝia produkto kaj ludas gravan rolon en pluapaŝa disvolviĝo de la navigacia transportado de nia lando.

Pena Batalado de la Komandantoj kaj Batalantoj de Iu PLA-a Trupo kontraŭ Tajdo

EN aŭtuno de 1969, iu loko ĉe la sudmara bordo estis atakita de potenca tajfuno malofte en la historio. Por protekti la vivon de la popolamasoj kaj la posedaĵojn de la ŝtato, la garnizona trupo de tiu loko disvolvis kortuŝe heroan batalon kontraŭ la ŝtormo kaj ondegoj kaj akiris venkon, alte tenante la standardon de unuiĝo kaj venko de la Naŭa Kongreso de la Partio kaj kun ĉionvenka heroismo.

FIRME GARDI LA GRANDAN DIGON

Antaŭvespere de la atako de tajfuno, la partia komitato de la garnizona trupo kunvokis urĝan kunvenon por aranĝi la batalon kontraŭ la potenca ŝtormo. La partia komitato alvokis la komandantojn kaj batalantojn stari sur la plejfronto de la batalo kontraŭ la tajfuno kaj oferi ĉion por protekti la interesojn de la popolo!

Respondante la alvokon de la partia komitato de la trupo, la komandantoj kaj batalantoj faris komunan ĵuron: "En protektado de la granda digo, la armeanoj staru antaŭ la amasoj; en translokiĝo al sekuraj lokoj, la amasoj iru antaŭ la armeanoj. Ni preferos oferi nian vivon ol lasi la amasojn ricevi damaĝon."

Frumatene, la surbordiĝanta tajfuno kunportanta torentan pluvegon levis vicojn post vicoj da ondegoj, kiuj furioze frapadis la maran digon


kun longeco de dekoj da lioj. Ĉe iuj malfortaj partoj de la digo ekaperis fendoj kaj truoj kaj okazis granda danĝero.

Tuj al tiuj lokoj alrapidegis sturmaj grupoj por urĝa savo sub la konduko de gvidantaj kadroj. Tiel furiozis la ventego kaj pluvego, ke oni ne povis firme stari aŭ teni la okulojn malfermitaj kaj por ĉiu antaŭenpaŝo oni devis venki grandajn malfacilojn. La grupanoj iris man-en-mane en la ŝtormo kaj pluvego kaj klopodis plenforte por venki la danĝeron.

Subite fendo aperis en la orienta digo kaj la tajdo furioze torentis tra ĝi.

"Ĝistu ĝin!" Kompartiano Ĉen Ĝihing, estro de la tria bombojetila roto, la unua sin ĵetis antaŭen kaj gvidis la sturman grupon ŝtopi la fendon per terplenaj sakoj kaj ŝtonoj. Tuj poste, proksime de la laborista barako alia breĉo estis farita de la tajdo kaj de sur la digo terbulegoj falis unu post alia. La batalantoj konkure alkuris, prenis ŝtonojn kaj terplenajn sakojn kaj ilin puŝis en la breĉon por rezisti kontraŭ la ondoj. Sed furiozegis la vento kaj rapidegis la torento, la ŝtonoj kaj terplenaj sakoj estis forportitaj, kaj la digo sub iliaj piedoj estis rapide detranĉata de la torento.

"Prezidanto Maŭ instruis al ni: 'Tiu ĉi armeo posedas spiriton sentime marŝi antaŭen, kaj ĝi



nepre faligos ĉiujn malamikojn, sed neniam estos subigita de malamikoj.' Por ke la popolamasoj sekure translokiĝu, ni nepre devas ŝtopi la breĉon spite al ĉiaj malfaciloj!" Apenaŭ finiĝis diro de la politika direktanto Ĝan Deluo, tuj Ĉen Ĝihing jam la unua saltis en la breĉon.

"Ni lernu la ekzemplon de la rotestro! Huang Giguang povis ŝtopi la aperturon de malamika mitralo, ni do ŝtopu la entorenton de tajdakvo per niaj korpoj!" Tion dirante, batalanto Ĝang Jankin saltis en la breĉon. Kaj lin sekvis la tria, kvara ĉiuj saltis en ĝin kaj formis solidan batalan kolektivon interplektante la brakojn unu kun la alia.

La komandantoj kaj batalantoj unuflanke helpis la revolucian komitaton en organizado de la amasoj por translokiĝo kaj, aliflanke, obstine batalis kontraŭ la tajdo por protekti la grandan digon kaj gajnis tempon por sekura translokiĝo de la amasoj.

BRAVEGA SINO FERRO

Tia furiozeco de la tajdo kaj la tajfuno estis neatendita. La malmultaj armeanoj kaj popo-

lanoj, kiuj ne havis eblecon ĝustatempe translokiĝi, estis sieĝataj de la tajdo kaj falis en danĝeran situacion.

Kaj sekve okazis streĉa batalo por savi la popolamasojn.

Apenaŭ la 416 popolanoj savitaj de 86 kadroj kaj batalantoj spite al vivdanĝero el iu marborda vilaĝo translokiĝis al konstruaĵo fortika sur alta loko, la tajdakvo jam kuratingis ilin muĝante kvazaŭ hurlantaj sovaĝbestoj. Rapide altiĝis la akvonivelo ĉe la konstruaĵo kaj baldaŭ fariĝis senlima maro ĉirkaŭe.

"Rapidu, tuj helpu la amasojn surgrimpi la tegmenton!" La politika komisaro de la regimento Ju Ĉunŝeng donis ordonon. Batalantoj tuj alportis du ŝtupetarojn kaj helpis la popolojn suriri la tegmenton.

La popolanoj surtegmentiĝis en sekuro. Kaj la tajdakvo baldaŭ leviĝis ĝis la rando de la tegmento. Tiel furiozis la ŝtormo, ke la homoj ne povis firme stari aŭ sidi. La batalantoj ĉirkaŭis la amason kaj en la flanko fronte al la vento ili formis homan muron interplektante siajn brakojn

por ŝirmi la amason kontraŭ la vento kaj ondoj kaj persiste luktis tiamaniere ĝis la fina venko.

Kiam la tajdakvo altorentis, vicestro de iu roto kaj kompartiano Vang Bingŝen subite trovis, ke iu malriĉkamparanino staras en la ondaro kun knabineto en siaj brakoj. Vang Bingŝen rapidis al ili tra la ventego kaj ondoj, transprenis la knabineton kaj helpis la patrinon kuri al arbeto. La arbeto svingiĝadis en la vento kaj ondoj kaj la marakvo baldaŭ leviĝis ĝis la talio. Oni povis sin savi nur per surgrimpo de la arbo, sed la malgranda arbo ne povis teni tiel multe da homoj. Kion fari do? **“Ni mortas indan morton, se ni mortas por la popolo.”** Vang Bingŝen alte levis la patrinon kaj la knabinon, ke ili grimpu sur la forkon de la arbo, sed li mem staris en la ruliĝanta tajdakvo kaj protektis la patrinon kaj filinon per siaj manoj.

Post palpebrumo, la tajdakvo jam leviĝis ĝis la brusto de Vang Bingŝen, sed li staris tute sentime kaj senmove.


La akvo glutis la ŝultrojn de Vang Bingŝen, sed li staris senmove kvazaŭ ŝtala batalanto kaj liaj okuloj disradiis brilon de senŝanceliĝeco.

La maraj ondoj kovris lian verton, sed liaj fortaj manoj levitaj el la akvo ankoraŭ alte teniĝis, plue.....

Kiam studentinoj, kiuj ricevis hardadon en PLA, falis en akvon, Vang Kiuping, estro de la kemia sekcio de iu trupo, ilin tiris el la akvo unun post alia. Kiam li estis savanta la lastan studentinon enakviĝintan, vico da ondegoj alruliĝis kaj portis lin en la maron. Por savi siajn klasajn fratinojn, kamarado Vang Kiuping, kiu bataladis pli ol 20 jarojn por la revolucio, glorie oferis sian karan vivon.

La popolamasoj elsaviĝis, sed parto de la kadroj kaj batalantoj, kiuj klopodis por translokigi la amasojn, estis ĉirkaŭataj de tajdakvo.

Sur peco de digo 2.5 metrojn longa kaj 4 metrojn larĝa, 83 kadroj kaj batalantoj venintaj el kvin unuoj daŭre batalis kontraŭ vento kaj ondoj. Rompiĝis ilia interligo kun la supera instanco, ĉirkaŭe estis senlima akvo kaj la digpeco povis disfali en ĉiu ajn momento. En tiu kriza situacio, la vicsekretario de la partia filio kaj estro de la kvara roto Long Fulin brave elpaŝis, kolektis la kompartianojn kaj membrojn de la Komunisma



Junulara Ligo kaj diris en eksciteco: “Nun ni jam sukcese plenumis la taskon de translokigo de la amasoj, kaj nia nuna tasko estas persisti en nia batalo, venki ĉiajn malfacilojn kaj batalakiri la eblecon, ke ĉiuj kamaradoj venke revenu al sia trupo!”

En la senlima maro naskiĝis solida batala citadelo — provizora partia filio. Kvazaŭ magneto ĝi unuigis ĉirkaŭ si la 83 kunbatalantojn kaj fortigis ilian fidon pri venko.

La furioza ventego levadis ondegojn, kiuj sin jetis al la batalantoj muĝante kvazaŭ rabiaj rabbestoj kaj ruliĝis trans iliajn kapojn. Sed la ventego kaj ondegoj ne povis venki la solidan batalan kolektivon armitan per Maŭzedongpenso.

Kiam la ruĝa suno leviĝis en la oriento frumatene de la sekvanta tago, la batalantoj ekkantis *Ruĝas la Oriento* kun forta emocio, vizaĝe al la ruĝa suno. Finfine la 83 heroaj batalantoj, kiuj persiste luktis 36 horojn, triumfe revenis.

NOVA BATALO

Apenaŭ falis la tajdo, la partia komitato de la trupo jam donis jenan novan batalan ordonon:

“La malfaciloj de la popolamasoj ja estas ankaŭ niaj. Nun la urĝega tasko por ni estas helpi la amasojn restarigi la produktadon.”

La vastaj amasoj de komandantoj kaj batalantoj firme respondis al la alvoko de la partia komitato kaj ĉiuj marŝis al la plejfronto de helpado al la amasoj en restarigo de produktado. Propagandaj taĉmentoj de Maŭzedongpenso kaj kuraĉaj grupoj vizitis ĉiujn domojn unun post alia kunportante verkojn de Prezidanto Maŭ, insignojn kun portreto de Prezidanto Maŭ kaj vestojn kaj aliajn objektojn donacitajn de la kadroj kaj batalantoj por la suferantoj de la katastrofo, kaj propagandis al la popolanoj la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ “**unuiĝu por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn**” por fortigi la fidon de la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj pri restarigo de la produktado.

En la kamparo kaj sur la digo bolis la entuziasmaj popolamasoj batalantaj kontraŭ la naturo. Kun la revolucia spirito “**timi nek malfacilojn nek morton**”, la granda nombro da subtenantoj de PLA al agrikulturo batalis avangarde en la restarigado de produkto. En la tago kiam tajfuno atakis, batalanto Bi Keking estis pikvundita je la kapo fare de bambuo levita de ondego dum

savado de posedaĵoj de la ŝtato kaj savado de klasaj fratoj, poste li estis portita de fluo en la maron kaj fosis pli ol 4 horojn. Kaj kiam li surbordiĝis, li tuj svenis. La kamaradoj portis lin al la kuraca taĉmento kaj tuj post kiam oni kunkudris lian vundon, li jam komencis helpi la produktan brigadon transporti sterkon kaj transplanti plantidojn kune kun la roto. Vidante, ke la plugbovoj de la brigado dronis kaj oni ne havis brutojn por tiri plugilojn, la kadroj kaj batalantoj de la mitrala roto de la unua bataliono helpanta la popolanojn de Guangju-brigado de Didu-komunumo diris decideme: “Ne havante bovon, ni mem tiru plugilon!” Sekve do ili komencis tiri plugilojn kaj erpilojn trioje aŭ duope sub la fajre arda suno kantante jenan kanton kun heroa sento:

Grandpaŝe ni tiradas la plugilojn

Volonte kiel bovoj de l' popolo.

Ne lacon timas ni, nek malfacilojn,

Ni penas por akiri de riĉikolto.

“**Malfacilo ja ne estas monstro nevenkebla; se ni ekbatalas por ĝin venki, tiam ĝi submetiĝos.**”

Sub la direktado de Maŭzedongpenso, la vastaj amasoj de armeanoj kaj popolanoj unuigis kaj batalis, kun nevenkebla heroeco, kontraŭ la ĉielo, kontraŭ la tero kaj kontraŭ la natura katastrofo kaj plej rapide neniigis la postsignojn de la katastrofo. La grandaj marbarantaj digo restariĝis ĉe la bordo de la Suda Maro, senlima kamparo denove sin vestis per verdo kaj ĉie regas plena viveco.

Vidante tiun prosperan bildon, la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj en la katastrofa areo ekmemoris pretervole la sangan historion antaŭ 48 jaroj. En tiu jaro, la loko estis atakita de forta tajfuno. Profitante la ĥaoson, kuomintanga armeo faris senbridan rabadon kaj la popolamasoj ricevis teruran perdon. En Huajangvilaĝo sola, el pli ol 600 vilaĝanoj mortis pli ol 500, falis domoj, dezertiĝis kampoj kaj multaj popolanoj formigris. La tajfuno de la lasta jaro estis multe pli granda ol tiu, sed dank' al la saĝa gvidado de Prezidanto Maŭ kaj la helpado de la Liberiga Armeo, neniu el la kelkaj miloj da popolanoj de tiu sama Huajangvilaĝo mortis. Iu pli ol 70-jara maljuna malriĉkamarano diris emocie tenante la manon de iu batalanto: “La du specoj de socioj, du specoj de armeoj kaj la du katastrofoj kun du malsamaj sekvaĵoj komprenigis al mi, ke ‘**sen popola armeo la popolo havas nenion**’. Prezidanto Maŭ estas la plej kara por ni kaj la Liberiga Armeo estas la plej bona!”

La Produktkvanto de Greno kaj Kotono de Ĝegiang-provinco Superis la Celojn en la “Programo de Agrikultura Disvolviĝo de la Tuta Lando”

Post riĉa rikolto de greno, Lanhi-gubernio de Ĝegiang-provinco aktive rezervas grenon por sinprepari kontraŭ milito kaj naturaj katastrofoj.





Riĉa rikolto de frua rizo en Giahing-gubernio de Ĝegiang-provinco

EN la Granda Proletara Kultura Revolucio, firme efektivigante kaj plenumante la grandan strategian orientilon de Prezidanto Maŭ “**sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo**”, forte tenante la revolucion kaj stimolante la produkton, la vastaj amasoj de malriĉkampanoj, malsuperaj mezkampanoj, aliaj komunumanoj kaj revoluciaj kadroj de Ĝegiang-provinco akiris sinsekvajn grandajn venkojn de stabila kaj alta produkto en la agrikulturo. Nun la produktkvanto de greno, kotono k. a. de la provinco jam superis la grandiozajn celajojn difinitajn en la “Programo de Agrikultura Disvolviĝo de la Tuta Lando”.

En 1969, la totala produktkvanto de greno de la provinco superis la plej altan nivelon en ĝia historio. La meznombra pomua grena produktkvanto en 1969 atingis pli ol 425 kg., t. e. je 15 kg. superis tiun de 410 kg. en 1966. Dank’ al riĉrikoltoj akiritaj en la sinsekvaj jaroj, la provinco liveris ĉiam pli multe da superflua greno por subteni la socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon de la patrolando.

Samtempe kun la akiro de stabila kaj alta produkto de la grenplantaĵoj, la tuta provinco ankaŭ akiris grandskalan pliprodukton de ekonomiaj plantaĵoj kaj flankokupoj. La pomua produkt-

kvanto de la sensemigita kotono stabile atingis pli ol 50 kg. dum la kvar sinsekvaj jaroj. En 1969, kompare kun tiu de 1965 antaŭ la granda kultura revolucio, la totala produktkvanto de kokonoj pliiĝis je pli ol 50 procentoj dum tiu de teo pliiĝis je ĉ. 40 procentoj. La meznombro de porkoj bredataj de ĉiu familio atingis pli ol 2.5 kapojn en la kvar sinsekvaj jaroj.

La antaŭensalto en la agrikultura produkto de la provinco estas venko de la proletara revolucia linio de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ super la kontraŭrevolucia reviziisma linio de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, estas rezultato de senprecedenca popularigo de la ĉiamvenka Maŭzedongpenso kaj estas rezultato de vasta kaj profunda disvolvo de la amasa movado “**lerni de Daĝaj en agrikulturo**”.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, alte tenante la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, la vastaj amasoj de malriĉkampanoj, malsuperaj mezkampanoj, aliaj komunumanoj kaj revoluciaj kadroj de la tuta provinco reguligis la totalan konton kun la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj pro iliaj damnindaj kontraŭrevoluciaj krimoj. Furioza fajrego de la revolucia amasa kritikado brulis en la ebenejoj, montregionoj kaj marinsuloj

tra la tuta provinco. Dank' al la profunda kaj longdaŭra disvolvo de la revolucia amasa kritikado, ili rapide levis sian konscion de klasbatalo kaj batalo inter la du linioj, multe stimulis siajn revoluciajn aktivecon kaj kreivon kaj antaŭenpuŝis grandskalan disvolviĝon de la agrikultura produkto. La vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris: "Ni nepre senŝanceliĝe efektivigos la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ kaj kondukos la socialisman revolucion ĝis la fino.

En la praktiko de la batalo la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj, aliaj komunumanoj kaj revoluciaj kadroj pli profunde perceptis la senkompare grandan potencon de Maŭzedongpenso kaj pli fortigis sian proletaran ardan amon al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Ili memkonscie metas vivan studon kaj vivan aplikon de Maŭzedongpenso sur la unuan lokon en ĉiuj laboroj. Persistante en viva studo kaj viva apliko de la "tri popularaj artikoloj", la vastaj

amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la tuta provinco starigis en si la penson terkulturi por la revolucio, memkonscie eliminante egoismon kaj starigante kolektivismon. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Hoŭfan-brigado de Daĉen-komunumo de Jivu-gubernio akcelis sian ideologian revolucion kaj per tio puŝis grandan disvolviĝon de produkto dank' al persista studo de la "tri popularaj artikoloj". En 1969, la pomua produktkvanto de grenoj de la brigado atingis pli ol 900 kg.

La vastaj amasoj de malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj, aliaj komunumanoj kaj revoluciaj kadroj de la tuta provinco decidis pluaŝe disvolvi la amasan movadon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, pli bone plenumi la diversajn batalajn taskojn elmetitajn de la Naŭa Kongreso de la Partio kaj akiri pli grandajn venkojn en revolucio kaj produkto en la kuranta jaro, por gajni gloron por la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la granda socialisma patrolando.



GRANDA LABOREJO DE SENMETANOLA FORMALDEHIDO

La revoluciaj laboristoj de la Anjang-a Plastofabrika de Henan-provinco de nia lando mem projektis grandan laborejon de senmetanola formaldehido, sukcese ĝin konstruis kaj muntis ĝiajn ekipaĵojn.

Senmetanola formaldehido estas materialo bezonata por la industrioj de plasto, ŝpinado kaj teksado, medikamentoj, ledo ktp. kaj produktado agrikultura, kaj precipe por produktado de altkvalita plasto por inĝenierado — poliformaldehido. La finkonstruo de tiu laborejo ludos gravan rolon por la disvolvo de nia industria kaj agrikultura produkto.

FACILE PORTEBLA TRANSISTORA APARATO DE TRANSVIOLA TERAPIO

Revoluciaj laboristoj, teknikistoj kaj kuracaj laborantoj de la Kontraŭimperiisma Hospitalo kaj aliaj institucioj de Pekino sukcese provfabrikis en kunlaboro facile porteblan transistoran aparaton de transviola terapio malgrandan kun originala strukturo.

La aparato bone efikas en kuraco de haŭtaj infektoj, ulceroj, inflamoj kaj erizipeloj, kaj de diversaj oftaj malsanoj sur diversaj partoj de la korpo kiaj karbunkoj, furunkoj, abscesoj k. s.

La produkta memkosto de tia aparato estas malalta kaj ĝi estas facile manipulebla. Por ĝin funkciigi oni bezonas nur ordinarajn sekajn pilojn kiel elektran fonton. Kuracejoj de ordinaraj fabrikoj, minejoj kaj vilaĝoj povas sin ekipi per ĝi kaj rondirantaj kuracaj grupoj povas ĝin kunporti.

La Unua Glacirompa Ŝipo de Nia Lando Estas Sukcese Lanĉita



La glacirompa ŝipo "Hajbing 101"

La unua 3,200-tonela glacirompa ŝipo "Hajbing 101" projektita kaj konstruita de nia lando mem estas sukcese lanĉita en Kiuĥin-ŝipkonstruejo de Ŝanhajo je la 26-a de decembro, 1969. Oni uzis nur 3 monatojn de la ekprojekto ĝis la lanĉo de tiu ĉi ŝipo. Tio ĉi estas nova frukto akirita de la revoluciaj laboristoj de Kiuĥin-ŝipkonstruejo en firma efektivigo de la granda orientilo elmetita de Prezidanto Maŭ: "Sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo" kaj "sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj".

En septembro de 1969, Kiuĥin-ŝipkonstruejo de Ŝanhajo akceptis la gloran taskon de projekto kaj konstruado de la unua glacirompa ŝipo de nia lando, kaj la vastaj amasoj de ĝiaj revoluciaj laboristoj ĉiuj estis kuraĝigitaj kaj ĝojis pro tio. Ili firme esprimis, ke ili nepre venkos ĉiujn malfacilojn kaj plenumos la taskon kiel eble plej rapide kaj plej bonkvalite, por gajni gloron por nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj granda socialisma patrio.

Konsiderante pri la grandeco de la korpo kaj la noveco de la strukturo de la glacirompa ŝipo, ili vive studis kaj vive aplikis la brilajn "tri popularajn artikolojn" kaj la brillan filozofian penson de Prezidanto Maŭ kaj persistis en analizado kaj solvado de la kontraŭdiroj per materiisma dialektiko. Ili organizis projektan grupon de triflanka

kombiniĝo kun laboristoj kiel la ĉefa parto kaj plenumis la projektan taskon en la mallonga tempo de nur iom pli ol unu monato.

Tiam ŝiplitejo de la konstruejo estis ne sufiĉe granda kaj ĝiaj levmaŝinoj ne sufiĉe fortaj. Por solvi tiun problemon, la veteranaj laboristoj fojrefoje studis la verkon de Prezidanto Maŭ *Pri Kontraŭdiro* kaj ili komprenis, ke la manko en ekipaĵoj estas malfavora kondiĉo, sed la homoj armitaj per Maŭzedongpenso tute povas ĝin ŝanĝi en favoran kondiĉon per aktiva klopodado kaj penado. Post serioza analizado kaj enketado, ili aplikis novan teknologion kaj fine plenumis la taskon de rekonstruo de la ŝiplitejo en nur 11 tagoj.

La poŭpa ŝafto de glacirompa ŝipo longas 15 metrojn, sed la tornilo de la ŝipkonstruejo povas prilabori nur 8-metran ŝafton. La laboristoj do metis du tornilojn en linio kaj fine venkis tiun malfacilon.

Por instali la tubaron de la ŝipo, oni bezonas almenaŭ 5 monatojn laŭ ordinara labormaniero. La muntistoj disvolvis sian subjektivan aktivecon kaj kreis novan teknologion de rekta instalado de la tubaro kaj sukcesis ĝin instali en unu fojo, altigante la laborefikon je kvin obloj, kaj la instalado estas pli ĝusta ol tiu farita laŭ la malnova teknologio, kio garantiis la ĝustatempan lanĉon de la glacirompa ŝipo.

Recenzo de la Redakcio de “Spegulo de Imperiismo kaj de Reviziismo” pri “RENTKOLEKTA KORTO”

TRAFOLIUMANTE la albumon oni havas la saman impreson, kiun oni havas kiam en magazino oni vidas bildojn de urboj Pompei kaj Erkolano kiuj antaŭ 2000 jaroj estis subite surŝutitaj de cindro erupciinta de la vulkano Vezuvo. Kvankam en la bildoj de la albumo ni trovas artismajn modlaĵojn dum ke en la elfositaĵoj de Pompei ni trovas nur misigitajn homkorpajn trafitaĵojn de la morto dum sia plena vivaktivado, ni trovas ion nepre komunan inter la ambaŭ bildaroj. La nevidebla linio tratrajtas la ambaŭ “statuarojn”. (Ankaŭ en la kazo de Pompei ni iel havas statuaron, ĉar oni plenigis per gipso la malplenaĵojn kiujn lasis en la vulkancindro la homformoj, tiel akirante, post forviŝo de la cindro, la figuron de l’ koncernulo de antaŭ 2000 jaroj). La obseda “io” estas la homa vivo de iam kiu reaperas antaŭ niaj okuloj.

La potenco de la revolucia arto trablovis en biendomo de ĉina feŭdmastro de antaŭsocialista Ĉinio kaj tie statuigis unu el la kutimaj tie vivscenoj por transvivigi ĝin al la postaj generacioj kaj epokoj kiel ateston de tiutempaj ekspluatado kaj subpremado.

Kaze de Pompei, post forviŝado de la cindro tie alŝutiĝinta antaŭe, oni foje vidis figuron, kiu reprezentis sklavon kiun la morto trafis kiam li estis ligita kiel gardhundo, per kateno, ĉe la domo de nobela mastro. Saman scenon atestantan la kruelecon de l’ kapitalista kaj imperiista sistemo socia ni trovas en la RENTKOLEKTA KORTO! La argila statuaro estas skulptita ĝuste en la nordokcidenta angulo de unu el la malnovaj biendomoj de la tirano, ĵus KIE tiuj scenoj bildigitaj iam REALE OKAZIS.

Inter tiuj muroj, kiuj en la antaŭsocialista epoko de Ĉinio vidis vere flui la larmojn kaj sibli

la vipojn, nun leviĝas, per la sana fortiko de la argilo kaj per la reviviga trablovo de la revolucia arto de la proletaro, tiu statuaro kiu edukas la vastajn amasojn de la ĉina kaj monda popoloj de generacio al generacio neniam forgesi klasbatalon kaj konscii pri la krimco de la kapitalistoj kaj bienuloj, pro kies kugloj, ankaŭ en Italio, nur antaŭ tri monatoj (dec. 68) du Siciliaj kamparanoj falis murditaj ĉe striko en Avola. En la unuaj paĝoj de la albumo impone leviĝas senspirige la simfonio de la homa sufero tie bildigita poreterne, kaj tio konkludiĝas en la lastaj paĝoj per la uragana ekstondro de la Ribelo, kiu sola naskas la Liberon!!

Ni vivece rekomendas al la k-doĵ havigi al si ĉi albumon, ĉu mendante ĝin ĉe ni aŭ ĉe ĈEL.



**RENTKOLEKTA
KORTO**

Nia Lando Donacis
Ekspozicion Kune
kun la Ejo al Albanio

La Ekspozicio pri la Atingoj en Socialisma Konstruado de Ĉinio



LA 14-an de januaro 1970, en la halo de "Ekspozicio pri la Atingoj en Socialisma Konstruado de la Ĉina Popola Respubliko" en Tiraneo okazis soleno, en kiu la Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉina registaro donacis la ekspoziciaĵojn kaj la ekspoziciejon al la Albana Partio de Laboro kaj la albana registaro.

La solenon ĉeestis: A. Carcani, H. Toska kaj S. Koleka, membroj de la Politika Buroo de CK APL kaj vicprezidantoj de la Konsilantaro de Ministroj de Albanio, A. Kellezi, alterna membro de PB de CK APL kaj prezidanto de la Albana-Ĉina Amikeca Asocio kaj respondeculoj de aliaj departementoj kaj reprezentantoj de amasaj organizoj.

Ĉeestis ankaŭ Geng Biaŭ, ĉina ambasadoro al Albanio, aliaj laborantoj de la ĉina ambasadorejo kaj ĉinaj laborantoj de la ekspozicio.

En la soleno parolis ambasadoro Geng Biaŭ kaj kamarado Kellezi.

En sia parolado ambasadoro Geng Biaŭ antaŭ ĉio esprimis dankon al APL kaj la albana registaro pro ilia kora zorgemo kaj granda helpo al la ekspozicio dum ĝiaj preparado kaj elmontrado.

Geng Biaŭ diris: Ni tre dankas al la albanaj kamaradoj, kiuj vizitis la ekspozicion kaj esprimis sian altan laŭdon kaj varmajn gratulojn al la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ kaj la ĉina popolo.

Li diris: En la batalo kontraŭ imperiismo, moderna reviziismo kaj diverslandaj reakciularoj kaj en socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, la du partioj, du registaroj kaj du popoloj de Ĉinio kaj Albanio ĉiam estas intimaj kunbatalantoj, kiuj kunlaboras inter si kaj lernas unu de la alia. Per tiu ekspozicio estas pli fortigitaj la revolucia amikeco kaj batala unuiĝo bazitaj sur Marksismo-Leninismo inter niaj du partioj, du registaroj kaj du popoloj.

Fine diris ambasadoro Geng Biaŭ: Vi heroa albana popolo jam akiris brilajn atingojn en la

Albanaj vizitantoj rigardas la modelon de ole-rafina ekipaĵo projektita de Ĉinio.





Albanaj vizitantoj rigardas la modelon de Daĝaj-brigado.

socialisma revolucio kaj socialisma konstruado dum la pasintaj 25 jaroj. Ni kredas, ke sub la saĝa gvido de APL, estrata de la granda marksist-leninisto kamarado Enver Hoxha, kaj sinapogante sur propraj fortoj, vi certe atingos ankoraŭ pli grandajn sukcesojn kaj konstruos Albanion en pli potenca lando, tiel ke la granda socialisma lampo en Eŭropo disradios ankoraŭ pli pompan brilon.

En sia parolado kamarado Kellezi antaŭ ĉio esprimis, en la nomo de la albana popolo, APL kaj APR, profundan dankon al Prezidanto Maŭ, KPĈ kaj la ĉina registaro pro la valora donaco — la konstruaĵo kaj ekspoziciaĵoj de la “Ekspozicio pri la Atingoj en Socialisma Konstruado de la Ĉina Popola Respubliko”, kiujn donis al Albanio KPĈ kaj la ĉina registaro. Li diris, ke tiu decido de KPĈ kaj la ĉina registaro estas alia elmontriĝo de la eterna revolucia amikeco, nerompebla unuiĝo kaj plena kooperado inter la du popoloj, du partioj

kaj du landoj de Albanio kaj Ĉinio sur la bazo de Marksismo-Leninismo kaj proletara internaciismo.

Li diris: Dum okazado de la “Ekspozicio pri la Atingoj en Socialisma Konstruado de la Ĉina Popola Respubliko” en nia lando, 720,000 albanoj el diversaj lokoj de la lando vizitis kaj pririgardis detale la ekspozicion kun granda intereso. Dank’ al tio ili persone informiĝis pri la elstaraj sukcesoj atingitaj de la genia ĉina popolo kaj ĉerpis de siaj kunbatalantoj nemal multe el ties riĉaj spertoj kaj nobla revolucia spirito en konstruado de socialismo kaj en defendo de la fruktoj de revolucio kaj de la diktaturo de la proletaro.

Li daŭrigis, ke la ekspozicio estas viva pruvo de la giganta forto de ŝtala unuiĝo en spirito kaj politiko, formita de la 700-miliona ĉina popolo ĉirkaŭ la glora kompartio kaj la granda gvidanto kaj eminenta marksist-leninisto kamarado Maŭ Zedong.



Hotelo "Jan-an"

EN la urbo Liuĝoŭ de Guanghi sin trovas hotelo, kiu portas la nomon de la revolucia sankta loko — Jan-an. Tiu ĉi hotelo kun nur pli ol 300 litoj situas proksime al la fervoja stacio de Liuĝoŭ. Kvankam ofte okazas, ke ĝiaj litoj estas ĉiuj okupataj, tamen ankoraŭ iuj vojaĝantoj venas al ĝi por tranokti. Antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, en tiaj okazoj ĝi ofte elpendigis tabulon kun vortoj "plene loĝata" kaj ne plu akceptis gastojn. Sed nun la afero okazis aliel.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ "Politika laboro estas vivlinio de ĉiu ekonomia laboro", sub helpo de la PLA-anoj subtenantaj maldekstrulojn, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la hotelo persistas en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, postulas sin laŭ la alta normo **tutkore kaj tutanime servi al la popolo** kaj abolis la rutinan regulon ne akcepti gastojn dum "plena loĝateco". Ili diris, ke akcepti plian gaston el la laboristoj, kamparanoj kaj sol-

datoj signifas kontribui pli da forto al la popolo.

Foje, en iu ventpluva nokto, la gastoj jam estis en dormo. Alvenis neatendite pli ol cent vojaĝantoj, kiuj petis tranokton. Ili ĉiuj estas reprezentantoj de diversnaciaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj vojaĝantaj por viziti Daĝaj-brigadon de Ŝanhi. Kvankam la litoj jam estis ĉiuj okupataj, tamen la servantoj sekvis la instruon de Prezidanto Maŭ "ekskluzive" kaj "senrezerve" servi al la popolo kaj firme diris: Spite al grandaj malfaciloj, ni nepre enloĝigos la intimulojn kaj ne lasos niajn klasajn fratojn foriri en pluvo kaj frosto al alia pli fora loko por serĉi hotelon. Tuj estis urĝa aranĝo. Iuj kunigis siajn litojn por kuŝigi pli da homoj, aliaj evakuis siajn ĉambrojn. Nur post la unua horo en la profunda nokto ili finis la aranĝon kaj sukcesis havigi kuŝlokojn al la pli ol cent malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Tiuj lastaj emocie diris al la servantoj: "Ni nepre portos al niaj hejmlukoj vian revolucionan spiriton tutkore kaj tutanime servi

al la popolo, por ke ĝi tie floru kaj fruktu.

La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Hotelo "Jan-an" ne nur varme akceptas la enloĝantajn gastojn, sed ankaŭ laŭeble zorgas pri vojaĝantoj ekster sia hotelo. Iun profundan nokton, sur la vojo al sia hejmo la estro de la hotela revolucia komitato kamarado Gu Jing vidis ok homojn vagantaj sur strato, kiuj portis pakaĵon sur la ŝultro. Li pensis en si: Vagante sur la strato en tia malfrua horo, tiuj verŝajne estas vojaĝantoj kiuj ne sukcesis trovi por si tranoktejon. Post demando, tio ne estis ekster lia konstato. Li tuj helpis ilin trovi loĝejon kaj daŭrigis la vojon al sia hejmo nur post la finaranĝo de ĉio por la lastaj.

Ĝuste tiamaniere la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la hotelo zorgas pri vojaĝantoj laboristaj, kamparanaj kaj soldataj en ĉiu afero, kaj varme servas al ili.

Pro la modelaj agoj ili ricevis laŭdojn de vojaĝantoj, kaj ankaŭ tiu hotelo fariĝis unu el la avangardaj unuoj en Liuĝoŭ.

Li diris, ke la grandiozaj atingoj de la heroo ĉina popolo sub la gvido de KPCĈ kaj Prezidanto Maŭ Zedong faris Ĉinion nedetruibla citadelo de la monda revolucio kaj socialismo kaj netrapasebla obstaklo por la insida plano de la usonaj imperiistoj kaj sovetuniaj reviziistoj.

En la fino kamarado Kellezi diris: Tiu ĉi tre valora donaco fariĝos simbolo de la senĉese disvol-

vigantaj eternaj amikeco kaj frate intima ligiĝo starigitaj inter niaj du popoloj, du partioj kaj du landoj.

La paroladoj de ambasadoro Geng Biaŭ kaj kamarado Kellezi estis de tempo al tempo interrompitaj de varmaj aplaŭdoj de la ĉeestantaro.

Post la soleno okazis koktela kunveno.

Amikeco trans Mantoj

Kaj Maroj

FLORO DE AMIKECO

Naŭ kilometrojn nordoriente de Konakri, la ĉefurbo de Gvineo, staras alta kaj vasta fabriko. Ĝi estas la unua metiejo de bambuaj kaj lianaj objektoj mane plektitaj, en kies starigo Ĉinio donis helpon al Gvineo. Tie oni povas vidi, ke multaj gvineaj junuloj laboras kune kun ĉinaj majstroj kaj kiel lerte kaj facile ili ĉiuj uzas siajn manojn. Tie estas videblaj ankaŭ diversaj, variaj, bele kaj bonkvalite plektitaj objektoj el bambuo kaj liano, kiujn faris la junaj laboristoj post duonjara lernado de la metio.

La konstruado de tiu metiejo estis oficiale komencita en februaro de 1968 sub la helpo de ĉinaj inĝenier-teknikistoj senditaj de la ĉina registaro laŭ la interkonsento pri ekonomia kaj teknika kunlaboro inter Ĉinio kaj Gvineo. Por ke la metiejo kiel eble plej frue finkonstruiĝu kaj servu al la gvinea popolo, firme tenante en la koro la instruon de Prezidanto Maŭ **“servi al la popolo de la tuta Ĉinio kaj la popoloj de la tuta mondo”**, la ĉinaj inĝenier-teknikistoj persiste laboris kune kun gvineaj laboristoj en eksterdoma temperaturo super 40° C, timante nek penadon nek laciĝon. Post energia laborado de la laboristoj kaj teknikistoj de Ĉinio kaj Gvineo, daŭranta pli ol 4 monatojn, la metiejo estis fine konstruita.

La novaĵo pri la fondiĝo de la metiejo rapide disvastiĝis inter la gvineaj popolamasoj. Senĉese venadis al ĝi vizitantoj el diversaj anguloj. Kiam tiuj gvineaj amikoj vidis la variajn, belajn kaj fortikajn metiaĵojn, ĉiuj senĉese laŭdis ilin kun admiro. Iuj virinoj kortuŝite ekdancis kaj kantis tenante en mano delikatan korbon bambuan. Iu maljunulo diris kun emocio prenante manon de ĉina teknikisto: “Kiel ni estas ĝojaj kaj fieraj, vidante la diversajn uzaĵojn, kiujn gvineaj junuloj

plektis el materialo produktata en nia propra lando sub via instruado! Dank’ al via sincera kaj senegoisma helpado realiĝis la revo, kiun ni havis de generacioj. Ni por ĉiam estas dankemaj al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ pro lia zorgemo al ni gvinea popolo.”

Krom produktado de bambuaj kaj lianaj plektaĵoj por kontentigi la bezonon de la merkato, la metiejo havas ankaŭ la taskon kulturi gvineajn teknikistojn kiel la ĉeffortojn bezonatajn por disvolvi la metion de bambua kaj liana plektado tra la tuta Gvineo.

Kiam la ĉinaj teknikistoj instruis la metion al junaj gvineaj laboristoj, ili pacience ripetadis la klarigon, eĉ mane tenante manon. Por ke la gvineaj junuloj rapide posedu la ŝlosilajn teknikojn, ili mem faris multajn modelojn kaj desegnojn kiel helpilojn en instruado. Tio ne nur garantiis la kvaliton de la produktaĵoj dum trejnado, sed pli grave multe rapidigis ekposedon de la tekniko al la gvineaj laboristoj. Post sepmonata kulturado, pli ol 80% de la junaj metilernantoj ekposedis la fundamentan teknikon de la metio. Proksimume 50% el ili povas memstare labori.

Juna laboristo Diallo Mamadou diris kun profunda kompreno el la propra sperto: “Ni povis tiel rapide ellerni la metion de plektado ĉefe pro tio, ke la ĉinaj kamaradoj traktas nin kiel fratojn kaj instruis al ni la teknikon senrezerve kaj pacience.”

DANKON AL LA BONAJ KURACISTOJ SENDITAJ DE PREZIDANTO MAŬ

En novembro de 1969, sub intima kunlaboro kun medicinaj laborantoj de Kongolando (B), membroj de la Ĉina Kuraca Taĉmento laborantaj en Fort-Rousset en la norda parto de Kongolando



Ĉinaj teknikistoj instruas bambuplektan arton al gvineaj laboristoj.

(B) sukcese detranĉis grandan ovarian tumoron pezantan 15 kilogramojn el la korpo de 63-jara pacientino kongolanda (B). Tiu sukcesa operacio ĝuis varman laŭdon de la registaro kaj popolo de Kongolando (B). La kongolanda (B) semajna revuo *Etumba* montris, ke la sukceso de tiu operacio estas "venko de la ĉiamvenka Maŭzedongpenso".

La maljunulino Ngala Ngakosso suferis de la tumoro jam 4 jarojn. Ŝi havis ankaŭ altan sangpremon, arteriosklerozon kaj astman bronkiton. Antaŭ unu jaro ŝi faris vojaĝon de pli ol 100 kilometroj al iu hospitalo en la ĉefurbo Brazzaville por peti kuracon, sed tie iu fremdlanda kuracisto diris al ŝi flegme: "Vi havas astmon, ne eblas al vi fari operacion." Ŝi devis malespere reveni al sia hejmo.

Lastan septembron ŝi venis al Fort-Rousset por peti helpon ĉe la Ĉina Kuraca Taĉmento. La ĉinaj medicinaj laborantoj varme akceptis la pacientinon

en la hospitalon sekvante la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ tutkore kaj tutanime servi al la popolo. Kune kun kongolandaj (B) kuracistoj ili faris detalan kaj plenan ekzamenon pri la malsanoj de Ngakosso kaj diagnozis ke la granda tumoro estas benigna. Ili decidis fari operacion por la malsanulino.

Sed Ngakosso estis grandaĝa kaj tre malforta pro multjara turmentado de malsanoj. Cetere la hospitalo ne estis tre bone ekipita. Tial estis multaj malfaciloj por fari tian komplikan operacion. Antaŭ ĉio la ĉinaj kuracistoj faris al ŝi serion da kuracadoj kiel preparon por la operacio. Kune kun la kongolandaj (B) kuracistoj, ili ripetade studis kaj diskutis la kazon, detaleme kalkulis pri ĉiuj eblaĵoj en la operacio kaj kune ellaboris planon por la operacio.

Kiam ĉio estis en ordo, la operacio komenciĝis antaŭtagmeze de la 6-a de novembro. Kun plena

memfido la ĉinaj kuracistoj iris al la operacia tablo. Dum operaciado aperis nova malfacilo. Kiam la tumoro estis baldaŭ deportota, subite la sangpremo de la pacientino ree falis kaj la stato estis tre danĝera. Sed la ĉinaj kuracistoj senkonsterniĝe alprenis efikajn rimedojn por sekurigi la vivon de la pacientino. Post pli ol trihora streĉa batalo, la 15-kilogramo tumoro estis fine elportita.

Post la operacio, Ngakosso rapide resaniĝis sub la zorgema flegado de la ĉinaj kaj kongolandaj (B) medicinaj laborantoj. En la tago de ŝia elhospitaliĝo, ŝi estis en festa kostumo kaj fotigis sin gaje kune kun la ĉinaj medicinaj laborantoj, respekte tenante en la manoj portreton de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ. Ŝi diris kun emocio: "Dankon al la bonaj kuracistoj senditaj de Prezidanto Maŭ, kiuj savis mian vivon. Mi kore deziras eternan vivon al Prezidanto Maŭ!"

ĈINA-MALIA AMIKECA PUTO

La Ĉina-Malia Amikeca Puto estas puto laŭdata de ĉiuj Dougabougou-vilaĝanoj, kiun konstruis por ili ĉinaj sukerrafinaj teknikistoj dum siaj postlaboraj horoj.

En la vilaĝo kun ĉ. mil loĝantoj mankis puto en la pasinteco. Akvon oni devis alporti sitelon post sitelo el proksima kanalo.

Vidinte la maloportunon post sia alveno al la vilaĝo, la ĉinaj teknikistoj meminiacie decidis konstrui puton por la vilaĝanoj. Ili peneme luktis dekelkajn vesperojn kaj fine sukcesis konstrui la puton venkinte multajn malfacilojn pro manko de fakaj scioj.

Dum la daŭro de ilia konstruado multaj vilaĝanoj rigardis ĉirkaŭ ili kaj senĉese kriis: "Bona estas la popola Ĉinio! Bona estas Maŭ Zedong!" "Dankon al vi, ĉinaj fratoj el malproksimeco!" Iu maljuna kamparano firme prenis manon de ĉina teknikisto kaj diris emociite: "Vi vere estas bonaj specialistoj de Prezidanto Maŭ. Vi sufiĉe laciĝis en helpado al ni por konstrui sukerfarejon, tamen tiel zorgas pri la vivo de niaj vilaĝanoj. Mi ankorau neniam vidis fremdlandanon, kiu estas tiel sincere amika al la malia popolo kiel vi."

La vilaĝanoj de Dougabougou nomis la puton Ĉina-Malia Amikeca Puto por esprimi sian dankon al la ĉina popolo.

Kulturaj Novaĵoj

Ekspozicio de Ĉinaj Bildoj en Parizo

En la 13-a kaj 14-a de decembro, 1969, la Franca-Ĉina Amikeca Asocio okazigis Ekspozicion de Ĉinaj Bildoj en la 14-a kvartalo de Parizo, por prezenti la grandajn venkojn de la socialisma revolucio kaj la grandajn atingojn de la socialisma konstruado en Ĉinio, kaj tiu ekspozicio estis varme bonvenigata de la vizitantoj.

En la halo de la ekspozicio pendis giganta kolora portreto de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la nacia standardo de la Ĉina Popola Respubliko, kaj krome pendis tie ankaŭ rubandego kun la slogano pri la unuiĝo kaj amikeco inter la popoloj de Francio kaj Ĉinio.

La pli ol du cent bildoj kaj grandaj papertranĉaĵoj kaj plakatoj vivece spegulis la batalan procezon kaj grandajn venkojn de la Granda Proletara Kultura Revolucio de Ĉinio persone iniciatita kaj gvidata de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kortuŝajn scenojn de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio venke iranta sub la persona prezidado de Prezidanto Maŭ kaj la atingojn de la ĉina popolo en revolucio kaj produkto.

En la ekspozicio oni ankaŭ prezentis ĉinajn filmojn. La vizitantoj rigardis la ekspozicion kaj filmojn. Ili ĝojis pro la grandaj venkoj akiritaj de la ĉina popolo kaj estis kuraĝigitaj. Multaj vizitantoj, kun estimo kaj amo al Prezidanto Maŭ, foliumis kaj aĉetis verkojn de li kaj librojn kaj gazetojn pri la atingoj de Ĉinio en ĝiaj socialismaj revolucio kaj konstruado, ĉe la librostando.

La 13-an de decembro, Sophie Mayoux, membro de la delegacio de la Franca-Ĉina Amikeca Asocio al Ĉinio raportis en kunveno en la 20-a kvartalo de Parizo pri la impresoj, kiujn li ricevis dum sia vizito al Ĉinio antaŭ nelonga tempo. Lia raporto estis varme aplaŭdita.

Ekspozicio de Ĉinaj Modernaj Fajencaĵoj kaj Porcelanaĵoj en Svedio

Ekspozicio de Ĉinaj Modernaj Fajencaĵoj kaj Porcelanaĵoj prenis lokon en la sveda urbo Stokholmo kaj

estis varme bonvenigata kaj laŭdata de vastaj amasoj. La vizitantoj alte taksis la novtipajn fajencajn kaj porcelanajn artaĵojn kreitajn de la ĉina popolo dum la Granda Proletara Kultura Revolucio, sub la direktado de la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ.

La ekspozicio inaŭguriĝis je la 2-a de januaro en la Arta Galerio de Lilĝevalĉ en Stokholmo. Ĝi estis kune aranĝita de la nomita galerio, la Sveda-Ĉina Asocio kaj la ĉina ambasadorejo en Svedio. Pli ol 700 personoj ĉeestis la inaŭguron.

Multaj vizitantoj kun estimo rigardis la gigantan koloran porcelanan portreton "Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin en la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio". Iu maljunulo el kamparo diris ĝoje: "La afabla kaj bonkora vizaĝo de Prezidanto Maŭ igas min senti, ke mi plenas de forto."

La vizitantoj faris altan takson pri la modernaj fajencaj kaj porcelanaj artaĵoj de Ĉinio montritaj en la ekspozicio. Iu artisto diris: "Tiu ĉi ekspozicio disradias la brilon de la venko de la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ. Literaturo kaj arto nepre devas esti **'por la popolamasoj, antaŭ ĉio por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj'**, por servado al la afero de socialisma revolucio. Tie ĉi ni trovis la ĝustan direkton el la ĉinaj revoluciaj literaturo kaj arto direktataj de Maŭzedongpenso." Alia vizitanto esprimis: "La revoluciaj artaĵoj de Ĉinio estas kombinaĵoj de evidenta revolucia enhavo kaj perfekta arta formo. La sveda popolo ŝatas tiajn artaĵojn."

Ankaŭ la porcelanaj statuaroj pri la revoluciaj modelaj teatraĵoj "Ŝagiabang" kaj "La Ruĝa Signal-lanterno" kaj la revolucia moderna baledo "Blankhara Knabino" ricevis varmajn laŭdojn de la vizitantoj.

Post trarigardo de la ekspozicio, vizitantoj skribis varmajn vortojn en la notlibro por la vizitantoj, per kiuj ili laŭdis la saĝan gvidon de la granda gvidanto

de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ, la Grandan Proletaran Kulturalan Revolucio de Ĉinio kaj la atingojn akiritajn de Ĉinio en sia socialisma konstruado. Iu sveda amiko eĉ skribis la ĉinajn ideografiaĵojn signifantajn: "Vivu Prezidanto Maŭ!"

La Sukcesa Unua Prezentado de la Akrobata Trupo de Tanzanio

En decembro de 1969, la Akrobata Trupo de Tanzanio revenis de Ĉinio al Tanzanio kun eminenta akrobata arto, post kvarjara diligenta lernado kaj ekzercado en Ĉinio, kaj faris sian unuan prezentadon en sia ĉefurbo Dar-es-Salam. Ĝia sukcesa prezentado rikoltis varmajn laŭdojn de la rigardantoj.

La prezidanto de Tanzanio M. J. K. Nyerere, ĝia dua vicprezidanto R. M. Kawawa kaj la ĉina vicministro de fervojo Guo Lu tiam vizitanta Tanzanion rigardis la prezentadon.

Antaŭ la komenco de la ludado, sinjoro C. Y. Mgonja, estro de la tanzania ministerio de edukado faris mallongan paroladon, en kiu li esprimis dankojn al la ĉina registaro pro ĝia helpo en trejnado de tanzaniaj akrobatistoj.

Kiam sloganaj rubandoj kun ĉinaj ideografiaĵoj kaj svahiliaj vortoj signifantaj "vivu la amikeco inter la ĉina kaj tanzania popoloj!" "la popoloj de la tuta mondo, unuiĝu!" aperis sur la scenejo, varmaj aplaŭdoj aŭdiĝis foje kaj refoje en la teatro. La programeroj prezentitaj de la junaj akrobatistoj rikoltis altajn laŭdojn de la rigardantoj.



TRAKTORO TAŬGA POR DIVERSAJ LABOROJ

La vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj de la Oktobra Traktoro Fabriko de Hingiang

de nia lando sukcese provproduktis, kun la revolucia spirito kuraĝi pensi kaj kuraĝi agi, specon de novtipa traktoro. Ĝi taŭgas por fari laborojn de plugo, semado, falĉo de tritiko, draŝado, transporto ktp, kaj estas varme bonvenigata de agrikultivejaj laboristoj kaj komunumanoj.

Tia traktoro estas pli avangarda ol ĉiuj aliaj antaŭe produktitaj de la nomita fabriko. Oni aplikis al ĝi la dizelon malvarmigatan per akvo produktitan de tiu fabriko. La olea konsumkvanto de tia traktoro estas relative malalta.

一封¹ 讀者 来信

Yī Fēng Dúzhě Láixìn
(unu ... leganto letero)

Letero de Leganto

多年 来² 我 一直 阅读 你們的 刊物 “人民 中国 报道”。
Duōniǎn lái, wǒ yīzhí yuèdú nǐmende kānwū Rénmín Zhōngguó Bàodǎo.
(multaj jaroj ... mi ĉiam legi via gazeto popolo Ĉinio raportoj
De multaj jaroj mi seninterrompe legas vian gazeton El Popola Ĉinio.

它 帮助 我 了解了³ 社会主义的 中国。
Tā bāngzhù wǒ liǎojiěle shèhuìzhǔyide Zhōngguó.
ĝi helpi mi kompreni socialism-a Ĉinio
Ĝi helpas min informiĝi pri la socialisma Ĉinio.

我 衷心地 祝贺 中国 人民 在⁴ 伟大的 无产阶级的 革命
Wǒ zhōngxīnde zhùhè Zhōngguó rénmin zài wěidàde wúchǎnjiējide géming
mi elkore gratuli Ĉinio popolo je granda proletar-a revolucio
Mi elkore gratulas la ĉinan popolon pro ĝia granda progreso akirita sub la gvido de

导师 毛主席 领导 下* 取得的 巨大 进步。 社会主义的
dǎoshī Máozhǔxí lǐngdǎo xià qǔdéde jùdà jìnbù. Shèhuìzhǔyide
instruanto prezidanto-Maŭ gvidi ... akiri granda progreso socialism-a
Prezidanto Maŭ la granda revolucia instruanto de la proletaro. La socialisma

中国 不仅 在⁴ 经济、科学、文化 方面* 有 飞跃 发展，
Zhōngguó bùjǐn zài jīngjì, kēxué, wénhuà fāngmiàn jǒu fēiyuè fāzhǎn,
Ĉinio ne nur je ekonomio scienco kulturo flanko havi flug-salti disvolvi
Ĉinio flugrapide disvolviĝis ne nur en ekonomio, scienco kaj kulturo, sed ankaŭ malfermis

而且 为 进一步 巩固 无产阶级 专政 将⁵ 社会主义 革命
érqiě wèi jìnyībù gǒnggù wúchǎnjiējì zhuānzhèng jiāng shèhuìzhǔyì géming
sed ankaŭ por pliapaŝe solidigi proletaro diktaturo ... socialismo revolucio
brilan vojon por pliapaŝe solidigi la diktaturon de la proletaro kaj daŭrigi la socialisman

进行 到底 开辟 了 一条¹ 光明 大道。 中国 是 世界 革命
jìnxíng dàodí kāipìle yī tiǎo guāngmíng dàdào. Zhōngguó shì shìjiè géming
fari ĝis fino malfermi unu ... brila vojego. Ĉinio estas mondo revolucio
revolucion ĝis la fino. Ĉinio estas la espero de la monda

的希望。

de xīwàng.
... espero)
revolucio.

[Klarigo]

1. 封 propre signifas “fermi”, ĉi tie ĝi estas uzata kiel unuo-nomo por letero; 条 estas unuo-nomo por objektoj kun formo pli longa ol larĝa aŭ dika.
2. 来 propre signifas “veni”, ĉi tie ĝi montras la tempodaŭron de la komenco ĝis la nuno, iel simile al Esperanta “de”, sed metata post la koncernata vorto.
3. 了 uzata post verbo montras la sencon de “finplenumeco” aŭ “komenciteco”.

4. 在 iom similas al “je” en Esperanto, sed ĝi devas havi interrespondan vorteton kun signifo de lokeco, tempo, ktp. post si por fermi inter ili la koncernata(j)n vorto(j)n, kiel ĉi tie 下 (sube) kaj 方面 (flanko), signitaj per asterisko, por montri kondiĉon.
5. 将 ĉi tie montras ke la substantiva strukturo 社会主义 革命, kiu ĝin sekvas, estas objekto antaŭiranta la verbon. En la ĉina lingvo objekto ĉiam staras post verbo, tial necesas speciala signo, kiam la kutima ordo estas renversita.


La Nova Erao de Mondrenversa Revolucio

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruas al ni: “La sekvantaj 50 ĝis 100 jaroj proksimume depost nun estos granda erao de ĝisfunda ŝanĝo de la socia sistemo en la mondo, estos mondrenversa erao, kun kiu neniu ajn pasinta historia erao povas sin kompari.”

La historio de la sesdekaj jaroj elokvente pruvis tiun grandan antaŭdiron de Prezidanto Maŭ.

La pasinta jardeko estis jardeko, en kiu la malamiko putriĝas tagon post tago, dum nia afero pliboniĝas kun ĉiu tago; estis jardeko, en kiu Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso faris publikajn polemikojn kaj intenan lukton kontraŭ moderna reviziismo kaj gajnis grandajn venkojn; kaj estis jardeko, en kiu vigle kaj impete disvolviĝis la granda batalo fare de la tutmondaj revoluciaj popoloj kontraŭ imperiismo estrata de Usono, moderna reviziismo kun sovetunia reviziismo kiel la centro kaj la diverslandaj reakciuloj.

Nun, la proletaro kaj revoluciaj popoloj de la tuta mondo fiere marŝis en la grandajn sepdekajn jarojn per gigantaj batalaj paŝoj.



*Mozambikaj gerilanoj
batalantaj en arbaro*

毛沢東思想の
偉大な勝利
万才万万才!

Alte tenante la sloganan tabulon "Vivu, longe vivu la granda venko de Maŭzedongpenso!", la japanaj popoloj faras manifestacion.



Batalantoj de la Liberiga Armeo de Suda Vjetnamio estas en militiro.





Usonaj strikaj laboristoj faras bravan batalon kontraŭ reakciaj policianoj alvenintaj por subpremado.

En aŭgusto, 1968, la sovetunia reviziisma renegata kliko sendis siajn trupojn invadi Ĉeĥoslovakion kaj ricevis fortajn kondamnojn kaj oponojn de diverslandaj popoloj. Jen la urbanoj de Bratislava, Ĉeĥoslovakio, sieĝis kaj surgrimpis tankon de la okupantaj trupoj de la sovetunia reviziismo kaj kondamnas ĝian agresan krimon.





*Tenante ruĝajn standardojn,
la francaj popoloj faras
manifestacion.*

*Anglaj kamparanoj faras po-
tencan manifestacion por pro-
testi kontraŭ la ekonomia
politiko de la brita registaro.*



Gerilaj Trupoj de Palestina Popolo

Fariĝas Ĉiam Pli Fortaj en Bataloj

VENKE antaŭeniras la armita batalo de la palestina popolo kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝia lakeo izraelaj agresantoj.

Palestinaj gerilaj trupoj faris multajn malfacilajn heroajn batalojn, donante al la izraelaj agresantoj kaj ilia mastro ĉiam pli pezajn batojn. La trupoj fariĝas ĉiam pli fortaj dum la batalado kaj akiris brilajn atingojn, forte kuraĝigante la arabajn popolojn en ilia batalo kontraŭ la usonaj kaj izraelaj agresantoj.

BRILAJ MILITATINGOJ

La agada areo de la palestinaj popolaj gerilaj trupoj grandiĝas tagon post tago. En la areo okupata de izraelaj agresantoj, de Golanaj Altaĵoj de Sirio en nordo ĝis la haveno Eilat de la golfo Akaba en sudo kaj de la rivervalo de Baisan okcidente de la rivero Jordano kaj la monta regiono Nablus ĝis Jerusalemo kaj aliaj urboj, ĉie brulas ardaĵoj de armitaj bataloj. Ankaŭ la arco sub la izraela regado, inkluzive de ĝia rega centro Tel Aviv, estas ofte atakata de gerilanoj. Krome la palestinaj gerilanoj plurfoje atakis la olekondukan tubegon de la usona Araba Ŝtonolea Kompanio, kaŭzante pezajn perdojn al la usona monopola kapitalo.

Laŭ komuniko de la palestinaj popolaj armitaj fortoj, de januaro ĝis novembro en 1969, palestinaj gerilanoj faris pli ol 2,000 atakojn kontraŭ la malamiko, kaj en unu semajno de decembro ili atakis pli ol 180 fojojn. Nun la agado de palestinaj gerilanoj ampleksas vastan areon de Palestino. La nacidefenda ministro de Izraelo lamentis, ke "neniam la izraelaj trupoj trovis la lokon (la

areon sub izraela regado) paca ekde Junia Milito (1967)".

La armitaj fortoj de Palestino lernas militarton en milito, kaj per flekseblaj taktikoj donis al la malamiko batojn. Ili aplikas la taktikojn de proksima kaj nokta bataloj por fari fortajn atakojn al malamikaj komandejoj, kazernoj kaj gvatejoj, interrompi la fervojajn kaj ŝoseajn liniojn, embuski malamikajn patrolantajn trupojn kaj ĉarojn kaj bombi malamikajn militajn instalaĵojn. Tiamaniere ili grandakvante ekstermis vivhavajn fortojn de la malamiko. Laŭ nekompleta statistiko, la palestinaj gerilaj trupoj detruis almenaŭ pli ol 170 artileriajn poziciojn en 1969. La palestina sturma taĉmento "Assifa" ekstermis komplete 11 izraelajn patrolojn sole en februaro de 1969. Ĉio ĉi tio montras plene la potencon de popola gerila milito.

LA MILITO HARDIS LA POPOLON

La milito edukas kaj hardas la popolon. Dank' al la praktiko en la milito, la palestina popolo ĉiam pli klare konas la grandan veron "**El la pafilo venas ŝtatpotenco**". La grandanombraj palestinaj kaj arabaj laboristoj, kamparanoj, studentoj kaj aliaj junuloj aliĝis konkure al gerilaj trupoj kaj aktive partoprenas la kontraŭagresan militon.

En multaj bazlokoj kaj trejnejoj de la gerilaj trupoj de la palestina popolo, oni konstante lernigas verkojn de Prezidanto Maŭ al la komandantoj kaj batalantoj, por ke ili akiru el ili saĝon kaj forton por la revolucia batalo. Tial la politika konscio de la batalantoj senĉese leviĝas kaj ili



Gerilanoj de la palestina naciliberiga movado (Al-Fatah) levante siajn pafilojn ĵuras: "Firme batalu ĝis liberiĝo de Palestino."

scias por kio ili batalas. Ĉiam, kiam al ili estas asignitaj taskoj, ĉiuj gerilanoj konkure partoprenas batalon, en kiu ili heroe kaj obstine klopodas plenumi la taskojn.

La revolucia milito estas milito de la amasoj; ĝi povas esti farata nur per mobilizo de la amasoj kaj dank' al ilia apogo. La palestinaj gerilaj trupoj profunde enradikiĝis en la popolamasoj kaj starigis kun ili sangan kaj karnan rilaton. Malgraŭ ke la izraelaj agresantoj pli fortigas sian faŝisman subpremon por ĉiarimede interrompi la rilaton inter la gerilaj trupoj kaj la popolamasoj, sed la popolamasoj en la regiono okupata de Izraelo daŭre helpas la gerilajn trupojn kaj kunagadas kun ili, riskante sian vivon kaj montrante maltiman spiriton antaŭ perfortaĵoj por forte bati la malamikojn.

En la bataloj, la palestina popolo profunde ekkonis ankaŭ tion, ke oni povas persisti en la batalo kaj akiri ĝisfundan venkon, nur per fortigo de unuiĝo. En la komenco de aŭgusto 1969,

sub unueca komandado kelkaj gerilaj trupoj de Palestino atakis la izraelajn agresantojn en la verda zono de la norda parto de la rivervalo de Jordano, ruinigis tri gravajn apogpunktojn, komplete ekstermis tieajn defendantajn malamikojn kaj akiris brilajn militatingojn.

Venke certe apartenas al la unuiĝinta kaj batalanta palestina popolo!

FIASKO DE LA MALAMIKA INTRIGO

La disvolviĝo kaj venkoj de la armita batalo de la palestina popolo teruris kaj maltrankviligis la usonan imperiismon kaj la sovetunian reviziisman social-imperiismon. Por kapti al si petrolajn fontojn kaj gravajn strategiajn punktojn kaj dividi influferojn en la Meza Oriento, ili intense konkuras unu kontraŭ la alia kaj samtempe reciproke komplotas en koluzio. Ili jen elĵetas "projekton" jen kolportas "planon" kaj krome okazigas t. n. "kvarpotencan konferencon" por "politike solvi" la problemojn de la Meza Oriento,

kun la intrigo allogi kaj devigi la arabajn landojn al kapitulaco per kontraŭrevolucia duvizaĝa taktiko, por detruigi la popolajn armitajn fortojn de Palestino. Sed la arabaj popoloj absolute ne falos en la kaptilon de la usona imperiismo kaj sovetunia reviziisma social-imperiismo. La intrigo de la lastaj pri "politika solvo" jam foje kaj refoje trafis hontindan fiaskon sub la malkovro kaj rebato de la palestinaj popolaj armitaj fortoj kaj de la tuta araba popolo.

Por subpremi la aktivadon de la palestinaj gerilaj trupoj, la usona imperiismo, unuflanke, intensigas la armadon al la izraela agresa armeo kaj, aliflanke, serĉas agentojn en arabaj landoj por ekstermi palestinajn trupojn per la manoj de reakciaj fortoj en tiuj landoj. Sub la instigo de la usona imperiismo, estis faritaj barbaraj subpremoj al la palestinaj gerilaj trupoj en aprilo, majo kaj oktobro de 1969. Sed sub la apogo de la vastaj arabaj popolamasoj la lastaj heroe batalis kaj malsukcesigis tiun insidan intrigon de la usona imperiismo.

La sovetunia reviziisma social-imperiismo ĉiam komplotas kun la usona imperiismo kontraŭ la

palestina popolo. Ĝi kalumnias kaj blasfemas la armitan batalon de la palestina popolo kiel "terorajn agadojn", kaj tio malkovras ĝian teruron kaj malamon kontraŭ la armita batalo kaj rezulte akiris al si malbonan famon. Lastatempe, ĝi ŝanĝis sian taktikon, ŝajnigante sin bonvola por "subteni" la armitan batalon de la palestina popolo. Sed ĝia celo estas tre klara, nome, intenci meti palestinajn armitajn fortojn sub sian kontrolon kiel kapitalon por fari malpuran negocon kun la usona imperiismo en la Meza Oriento, estingi la armitan batalon de la palestina popolo kaj dividi kun la lasta la Mezan Orienton.

Sed, kun ĉiu tago la heroaj popoloj de Palestino kaj arabaj landoj pli vekigis politike, ne kredante la mielajn vortojn de la usona imperiismo kaj sovetunia reviziisma social-imperiismo nek timante la minacojn kaj subpremojn de la usonaj kaj izraelaj agresantoj. Ili firme tenas la pafilojn en siaj manoj, persistas en armita batalo kaj faris neŝanceblan decidon daŭrigi la naciliberigan batalon kontraŭ la usonaj kaj izraelaj agresantoj ĝis la fino.

Fervoja stacio de izraelaj cionistoj furioze atakita de la heroaj palestinaj gerilantamentoj





LA POPOLA LIBERIGA ARMEO DE TAJLANDO SENĈESE AKIRAS NOVAJN VENKOJN

Sub la ĝusta gvido de la Komunista Partio de Tajlando, la heroa popolo de Tajlando lastatempe lanĉis atakojn kontraŭ la malamiko kaj aktive faris propagandon kaj organizadon de la amasoj en diversaj lokoj kaj akiris novajn venkojn.

En januaro, la Popola Liberiga Armeo de Tajlando brave embuskis armitan patrolon de Usono kaj ĝia lakeo Thanom-kliĉo en Ban Phaŭaj de Nakhon Thajgubernio, Phicanulok-provinco kaj mortigis kaj vundis 5 malamikojn. Kaj tuj post la venko de tiu batalo, tiu trupo de la Popola Liberiga Armeo faris brilan embuskon ĉe la malamika kazerno en Ban Phaŭaj-vilaĝo kaj ekstermis pli ol dek malamikojn.

Lastatempe, la Popola Liberiga Armeo de Tajlando ankaŭ faris oftajn atakojn al la malamikoj en Nakhon Srithamarat-provinco en la sudo, Phicanulok-provinco kaj Phetĉabun-provinco en la nordo kaj la provincoj Loj, Nakhon Phanom, Kalasin kaj Ubon Ratĉathani en la nordoriento, aktive propagandis, mobilizis kaj organizis la popolanojn, kaj ricevis varman bonvenigon kaj subtenon de la vastaj amasoj.

LA PATRIOTAJ ARMEO KAJ POPOLO DE LAOSO EKSTERMIS 4,300 MALAMIKOJN EN DU MONATOJ

En la unuaj du monatoj de la seka sezono de 1969-1970, la patriotaj armeo kaj popolo de Laoso ekstermis

pli ol 4,300 malamikojn, el kiuj pli ol 3,380 estis mortigitaj, kaj ĉirkaŭ mil estis vunditaj, kaptitaj aŭ kaptulacintaj devigate; ili kaptis kaj detruis ĉirkaŭ 900 diversajn armilojn, detruis pli ol 50 tankojn, kirasautojn kaj aliajn militajn veturilojn de la malamika armeo kaj faligis 5 usonajn aviadilojn.

Nokte de la 9-a kaj frumatene de la 10-a de januaro, la patriotaj armitaj fortoj de Xieng Khoang reprenis la areojn de Phounockok kaj Phouhok kaj ekstermis 30 el la malamikoj senhelpe defendantaj.

LA MOZAMBIKAJ PATRIOTAJ ARMITAJ FORTOJ DONIS SINSEKVAJN BATOJN AL LA MALAMIKO

Laŭ la milita komunikado publikigita de la Mozambikaj Patriotaj Armitaj Fortoj je la 12-a de januaro, en Dar-es-Salam, la Mozambikaj Patriotaj Armitaj Fortoj en oktobro kaj novembro de 1969 multfoje batis portugalajn koloniistajn trupojn en la suda kaj orienta partoj de Niassa, ekstermis pli ol 70 malamikojn, detruis 8 militajn veturilojn de la malamika armeo kaj liberigis nombron da mozambikanoj el "strategiaj vilaĝoj" kaj malliberejoj de la portugalaj faŝistoj.

La komunikado diris, ke dum tiu periodo, la Mozambikaj Patriotaj Armitaj Fortoj multigis la nombron de embuskoj kaj min-operacioj kontraŭ la portugalaj koloniistaj trupoj. Samtempe ili ankaŭ surprizatakis fortikaĵojn de la malamiko kaj donis al ĝi pezajn batojn. Je la 17-a de novembro, 1969, gerilaj batalantoj de Mozambiko embuskis malamikojn sur Mandalwe-Matip-a ŝoseo, surprizatakis la malamikan gvatejon ĉe Maldalwe kaj detruis ĝian armil-tenejon.



Mozambikaj gerilanoj sin ekzercas por pli forte bati la malamikojn.



Letero de F. M. (G. F. R.)

El via letero mi ĉerpas, ke Maŭzedongpenso en via lando estas ĉefe uzata kontraŭ egoismo, tio celas reformi la homan animon en la direkto for de la egoismo al la kolektivismo. Kolektivismo signifas forlasi sian propran "mi"-on, aŭ per aliaj vortoj: la "mi"-o servu la "ni"-on, kaj pensi pri la bonfarto kaj ĝusta vivovojo de la aliaj, ĉar ĉiu ja devas mem ekkoni kaj sekvi sian direkton: for de la egoismo, sindirekti al la kolektivismo.

La vorton kolektivismo ĉi tie oni nun ne tre ofte uzas. Oni ja ĉi tie estas edukataj al egoismo. Kaj tial la privata posedsistemo malhelpas la kolektivismon.

Mi kredas, ke vi kun Maŭzedongpenso multe progresas en la supervenko de la egoismo. Tial via estonteco estas pli certa, pli bela ol tiu de la egoistoj.

Letero de E. O. (Norvegio)

Mi interesiĝas pri artikoloj pri Ĉinio, la revolucio, industrio, agri-

kulturo, arto kaj scienco. Precipe mi interesiĝas pri artikoloj pri la revolucia batalo en Ĉinio kaj en aliaj landoj.

Mi deziras reaperigi poemojn kiel antaŭe sur unu aŭ du paĝoj en ĉiu numero. En mia opinio, ankaŭ pli multaj artikoloj pri la armita batalo en Latin-ameriko, Afriko, Azio kaj en la meza Oriento plibonigus vian gazeton.

Mi legas multajn revuojn, sed EPĈ estas la plej bona inter ili.

Senfinan longan vivon al la ĉina revolucio kaj la ĉina popolo!

Longe, longe vivu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ Zedong!

Letero de O. M. (DDR)

Via eldonata periodaĵo tre plaĉas al mi kaj estas samtempe bonuzbla organo, kiu konvinke montras, kiel belaspekte gazeto esperantlingva estas redaktata kaj povas servi al la tutmonda laboristaro.

Letero de T. T. (Finlando)

Vian revuon mi abonis pro tio, ke mi pli bone povu kompreni la fenomenojn de nia erao, la disvolviĝon de Marksismo, Leninismo kaj Maŭzedongpenso en florantan socialisman sistemon de via lando gvidata de la proletaro ekde 1949, la jaro de mia naskiĝo. Ankaŭ

mi antaŭvidas la totalan kolapson de la novkoloniismo kaj imperiismo impertinente praktikataj de Usono kaj Sovetunio. Mia opinio estas, ke en la fina batalo pri suvereneco en la mondo la armeo de via lando kun 700 milionoj da loĝantoj bone kaj ideologie kaj materiale organizitaj ne povas pereii en la finofara procezo. Nun ni vivas en la mondo, kie klasoj interbatalas kontinue laŭ la teorio de Prezidanto Maŭ. Nia generacio atestas la translokiĝon en la socialisman sistemon kaj en la ĉiopovan veran komunismon. Mi estas tute konvinkita pri tio.

Letero de D. F. C. (Britio)

Ni en Anglio estis treege malfeliĉaj pri la aferoj ĉe Vusuli-rivero kaj similaj lokoj laŭ la ĉina-rusa landlimo. Kompreneble, unue ni nur havis la neĝustajn raportojn de la anglaj ĵurnaloj kaj la rusaj anglalingvaj bultenoj; tamen, nun, dank' al E. P. Ĉ. kaj la speciala eldono kiun ni ricevis el vi, ni tute komprenas la bedaŭrindan aferon. Ĉiuj sincere esperas, ke ne okazos tutskala milito inter la du gravaj landoj kiuj dum multaj jaroj estis la ĉefaj apogiloj de la tutamonda komunista movado, sed, se ĉi tio fakte okazos, ni nun tute konstatos ke la kulpuloj estos sole deviismuloj de la sovetunia registaro.

Korespondi Deziras

Albanio

Mitro Kaci dez. kor. kun esperantistoj el diversaj landoj de la tuta mondo kaj interŝanĝi opiniojn pri diversaj temoj, fotografajojn, poŝtkartojn, ktp. La adreso: Krine, Girokastro.

Ĉeĥoslovakio

Festa Josef dez. kor. kun esperantistoj de ĉiaj landoj, precipe de Azio, Afriko kaj Latinameriko pri diversaj temoj en Esperanto aŭ angle aŭ germane. Lia adreso: Pecka č. 85, okres Jičín.

Germana Demokratia Respubliko

William Mock dez. kor. kun eksterlandaj amikoj. Li estas ĥemia laboristo kaj havas kvar gein-

fanojn. La adreso: 402 Halle/Saale, Emst-Moritz-Amdt-Str.6.

Rumanio

28-jara Irimescu Stan dez. kor. kun junuloj de Ĉinio kaj Japanio. Lia adreso: Scoalei 11, Bucuresti 24.

Svedio

S-ro Johano Kolinder, Poste Restante, Goteborg 3 (Vasagatan), 55-jara sola oficisto dez. kor. pri ĉiuj temoj, interŝ. fotojn kaj bildkartojn.

Sur la kovrilo:

Persistante en la orientilo de “sinapogo sur propraj fortoj” kaj “penema lukto en malfaciloj”, la Botanika Instituto de Ĉina Akademio de Sciencoj sukcese provfaris novan gumon — pekina tragakanto, kiu povas rezisti kontraŭ acidaĵo kaj alkalo. La foto montras, ke membroj de la laborista kaj PLA-a propagandaj taĉmentoj de Maŭzedongpenso kune kun scienca laboranto studas sintezan utiligon de tiu pekina tragakanto.

Sur la dorskovrilo:

Membroj de la tera stereofotografika kaj mezura grupo de la Instituto pri Glaciejo, Frosta Grundo kaj Dezerto de Ĉina Akademio de Sciencoj surgrimpis 20 montpintojn altajn je 6,000 ĝis 7,000 metroj super mar-nivelo en la regiono Ĝolmolungma. Ili faris, dank’ al 61 observaj punktoj, mezuradon al Ĝolmolungma-montpinto kaj tiel kreis miraklon en la mezura kaj desegna historio de la mondo.

Ĉefa Enhavo

Niaj Partiaj kaj Ŝtataj Kadroj Ĉiuj Estas Ordinaraĵoj Laboruloj

Vigleplena Batala Komandejo

Hju Jaŭgoŭ — Modelo en Ideologia Revoluciigo

Maljuna Tan Estas Bona Reprezentanto de Malriĉkamparanoj kaj Malsuperaj Mezkamparanoj

Dankojn al Nia Savanto Prezidanto Maŭ

Vasta Sablejo Fariĝis Verdejo

Socialisma Vojo Fariĝas Ĉiam Pli Larĝa

Rakontoj pri Sciencaj Laborantoj en Servo al Agrokulturo

Pena Batalado de la Komandantoj kaj Batalantoj de la PLA-a Trupo kontraŭ Tajdo

La Produktkvanto de Greno kaj Kotonono de Ĝegiang-provinco Superis la Celojn en la “Programo de Agrikultura Disvolviĝo de la Tuta Lando”

La Unua Glacirompa Ŝipo de Nia Lando Estas Sukcese Lanĉita

Nia Lando Donacis Ekspozicion Kune kun la Ejo al Albanio

Hotelo “Jan-an”

Amikeco trans Montoj kaj Maroj

Gerilaj Trupoj de Palestina Popolo Fariĝas Ĉiam Pli Fortaj en Bataloj

La Sunbrilo de Maŭzedongpenso

Lumigas la Vojon de Antaŭenmarŝo

por la Diversnaciecaj Popolanoj

Kun plej alta kvalito kaj plej granda rapideco, la revoluciaj diversnaciecaj gelaboristoj de la Janbian-a Presejo, Gilin-provinco, produktas la *Elektitajn Verkojn de Maŭ Zedong* kaj *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong* en korea lingvo.





Inter la armeo kaj popolo tra la tuta lando vige disvolviĝas la amasa movado de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso. Jen la tuta familio de Ŝader-ahong (*dekstre*), taĝika komunumano de Juegin-popolkomunumo de Piŝan-gubernio de Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, absorbite studas verkon de Prezidanto Maŭ.

Dum laborpaŭzo tajaj virinoj de Meng-haj-gubernio de Junnan-provinco serioze studas *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong*.





Turdi Majmajti, maljuna ujjura malriĉkamarano en Hingiang, vive studas kaj vive aplikas verkojn de Prezidanto Maŭ kaj laboras tutanime por la kolektivo, kaj pro tio li estas laŭdata de la amasoj kiel maljunulo tutkora por la kolektivo. Jen en kampranda kunveno pri studo kaj apliko de Maŭzedongpenso li parolas pri sia komprenajo en la studado.

Profundiĝinte en la paŝtan regionon, la medicinaj laborantoj de la Liberiĝa Armeo propagandas Maŭzedongpenson kaj alportas al la paŝtistoj la prizorgon de Prezidanto Maŭ. La armeanoj kaj popolanoj batalas ŝultron ĉe ŝultro por nepre konstrui la stepon de Interna Mongolio en fortikan pozicion por oponi kaj preventi reviziismon.





Kamaradoj de la taĉmento pri nacimalplimultaj laboroj de la Popola Liberiga Armeo studas kune kun la va-aj milicianoj de Junnan-provinco *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong*. Unuiĝinte ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Vicprezidanto Lin kiel la vicestro kaj “tenante la revolucion, stimolante la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito”, ili kune batalas por plifirmigi la diktatoron de la proletaro.



Estante en Tianŝan-montaro, kazahaj paŝtistoj en Hingiang korinklinas al Pekino. Jen ili aŭskultas disaŭdigon el Radio Pekino.



La Ginhiu-a Jaŭa Aŭtonoma Gubernio de Guanghi fondis radiostacion. Kaj en ĉiuj komunumoj kaj brigadoj de la gubernio estas instalitaj disaŭdigaj stacioj, kiuj ĝustatempe propagandas la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ.

Huang Linjing (*la dua de dekstre*), vicsekretario de la partia filio de Damej-brigado kaj membro de la revolucia komitato de Liugong-komunumo de Baŭting-gubernio, Guangdong-provinco, kiu diligente kaj vive studas kaj aplikas Maŭzedongpenson kaj neniam disiĝas de la amasoj, de la praktikado kaj de la produkta laboro, plurfoje ĉeestis kongresojn de aktivuloj en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ de la provinco kaj de Hajnan-regiono. Jen ŝi elverŝas sian koron kun siaj klasaj fratinoj.



